





1987 julio-aŭgusto
80a jaro
n-ro 979-980 (7-8)
aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun un kaj unesko)
sidejo: **nieuwe binnenweg 176 • 3015 bj rotterdam • nederlando**



Vi trovos,

ke eĉ jarcento havas finon. Kaj la unua nia — preter flusoj kaj malflusoj, venkoj kaj katastrofoj — havas finon feliĉan. Nia komunumo vivas kaj floras, transas la teron, en eta skalo kreas vere internacian kulturon. Kaj ĉio ĉi kreskis el la modesta libro, kiu aperis iun someran tagon en Varsovio. Miron kaj ĝojon vi trovos en la paĝoj de nia festa numero, eksterordinare bunta, enhave ampleksa, simbola pri movado kiu sojlas maturecon.

Sed sojlas nur. Vi trovos, ke niaj kontribuintoj dividas ankaŭ certan maltrankvilon, nekонтenton. Kaj bone tiel! Movado, kiu volas movi kaj moviĝi, bezonas ĉiam novajn sopirojn, novajn celojn, novajn alirojn. Tiaj ideoj ja ne mankas al ni — sed ni bezonas pli vastan diskuton pri ili, pli kritikeman sintenon. Mi sincere esperas, ke ne ĉio en ĉi tiu numero komforte sidos ĉe la legantoj. Nia festado de la unua jarcento restas samtempe inaŭguro de la dua, kaj precipe tiu ĉi meritas nian atenton!

La progreso de Esperanto en tiu jarcento nedisigeble ligiĝos kun progreso de la tutmonda organizaĵo de la esperantistoj. Jen ĝoja novaĵo: dum la presado de ĉi tiuj paĝoj, UEA trapasis siajn pasintjarajn membronombrojn kaj elanas al novaj rekordoj. Individuaj membroj, jam super 6700, povus rompi — unuafoje en 14 jaroj — la limon de 7000. Simbole kaj praktike, ĉi tiu celo indas je strebado: memorigu, instigu, subvenciu, donacu!

Pere de ni, pere ĝuste de vi, kiu nun legas ĉi tiujn vortojn, Esperanto kaj UEA survojas supren. La vojo ne estos facila, nek senpena. Sed ni enpaŝu la duan jarcenton man-en-mane, pretaj "per laboro de la esperantoj" fari nian kontribuon al pli justa, pli paca mondo.

Enhavo

- 121 Gaston Waringhien: Kaj tamen ni ĝin atingis!
- 122 Humphrey Tonkin: Tri celoj por komenci la duan jarcenton
Aleksandr D. Duliĉenko: Cent jaroj provizis unikan modelon por la ĝenerala lingvistiko
- 124 William Auld: Pensoj okaze de la centjara jubileo de Esperanto
- 126 André Albault: La unueco de Esperanto: esenca rolo de la Akademio
- 128 Juan Régulo Pérez: Kiel redakti kolektivan libron en Esperant(uj)o?
- 130 Baldur Ragnarsson: Koordinatoj
- 131 Mauro Nervi: Por la dua jarcento: realismo kaj socia ligiteco
- 132 Marjorie Boulton: Informi laŭ niaj ebloj
- 134 DLT-anonco: La estontaj pensmaŝinoj: ĉu denaske esperantlingvaj?
- 136 Ralph Harry: La diplomatoj kaj Esperanto: du vojoj al monda komunumo
- 139 Anna Brennan: La plej intima ligo
- 140 Edwin de Kock: Omaĝo por la centjara jubileo
- 141 Probal Daŝgupto: Per nova unueco-principo antaŭen en la Tria Mondo
- 143 Shen Chenru (intervjuo): Pordo por Ĉinio al scienc-teknika interŝanĝo kaj evoluo
- 145 Thomas Bormann: Ne hieraŭ aŭ postmorgaŭ, sed hodiaŭ!
- 147 Hans Eichhorn: Kaj tamen: Esperanto estas pli ol lingvo!

La kovrilo

Ja, kiel speguli la mondon de la esperantistoj per deko da bildoj?? La tasko tiel absurdas, ke ni ne kapablas seriozi pri ĝi! Sed ni tamen strebis kapti la homan esencon de Esperantujo. Lingvo, kulturo, movado — la ekzisto kaj progreso de ĉiuj tri dependas de tiuj, kiuj uzas Esperanton por komuniki kaj kompreniĝi, amikiĝi kaj enamiĝi trans lingvaj kaj kulturaj baroj: celoj profunde kaj universale homaj. Ĝuste pro tio ni povas atendi, ke ĝia dua jarcento estos epoko de disvastiĝo, kiam malgrandiĝanta mondo konsciiĝas pri ankoraŭ nur nebule, neklare sentata manko.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910); **establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Legata en 105 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: Mark Fettes.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 44,50; US \$ 21; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Adreso de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 436 10 44 kaj 436 15 39.

Telekso: 23721 uea nl.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). **Nederlanda poŝta ĝir-konto:** 37 89 64 (UEA).

Estraro de UEA

Prezidanto (planado, Jubileo): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; tel. (315) 265-6744; telekso (5) 9103500242 ud.

Vicprezidanto (Gvidas eksteran agadon): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (50) 35 49 35

Vicprezidanto (interna kaj ekstera agadoj): s-ro Yosimi Umeda, 2-15-10 Aobadai, Meguro-ku, Tôkyô, 153, Jap.; tel. (3) 770 64 86; telekso 02655177 eki j.

Ĝenerala sekretario (interna agado): d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u 5/b VII.22, H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23 274.

Estrarano (ekstera agado): d-rino Barbara Despiney, 21 rue des Cuverons, F-92220 Bagneux, Fr.; tel. (1) 46 65 22 16.

Estrarano (ekstera agado): prof. d-ro Ottó Haszpra, Rosenberg házaspár u. 5, H-1054 Budapest, Hung.; tel. (1) 316 423.

Estrarano (interna agado): s-ro Diccon Masterman, "Quasi in Cima", Via di Cicina 610, I-55029 S. Stefano di Moriano (LU), Italio; tel. (583) 570 66.

Estrarano (gvidas internan agadon): s-ro Jean-Louis Texier, 27 chemin des Carreaux, Cerny, F-91590 La Ferté Alais, Francio; tel. (1) 64 57 66 53.

Kaj tamen ni ĝin atingis!

Kiam, en 1917, mi konatiĝis kun Esperanto, mi estis frapita de ĝia facileco kaj fekundeco, sed tute ne zorgis pri ĝia eventuala estonteco. Kaj nun, kiam de la alto de miaj 70 jaroj da esperantisteco, mi rerigardas ĝian pasintcon, mi estas frapita de alia fenomeno: kontraŭe al aliaj sociaj novaĵoj, kiuj iom post iom konis senskuan kaj kontinuan disvastiĝon, la historio de nia lingvo, jam de la komenco, abundis je katastrofoj, kiuj normale devus ĝin pereigi.

Apenaŭ la unua gazeto *La Esperantisto* komencis varbi kelkan centon da abonantoj, la cara cenzuro tuj en 1895 malpermesis ĝian eniron en Rusujon kaj praktike metis finon al tiu vastigado.

Kiam, post la persista propagando de germanaj, anglaj kaj francaj intelektuloj, la movado ŝajne konkeris iom vastan publikon kaj oni rajtis esperi, ke la grandioza kongreso en Parizo 1914 donos al ĝi la deziratan konsekron, tiam la unua mondmilito eksplodis, rompante la samideanajn rilatojn interne de la esperantistaro.

Post tiuj mallumaj kvar jaroj ja estiĝis kvazaŭ renaskiĝo de la movado kaj renesanco de nia literaturo, sed tre baldaŭ ilin frapis proskripcio de Esperanto en Germanujo, en Sovet-Unio kaj en aliaj diktatoraj regnoj, kun, kiel natura sekvo, la dua mondmilito.

Sed al tiu serio da sortobatoj ne limiĝas la elprovado de Esperanto. Pli gravaj eble montriĝis la internaj malpaciĝoj, kiuj dividis kaj foje metis secesion en niaj vicoj. Tuj de la komencaj jaroj W.H. Trompeter, kies malavareco subtenis la eldonadon de *La Esperantisto*, ĉesigis sian apogon, kiam Zamenhof ne akceptis la lingvajn modifojn, per kiuj li volis pligermanigi Esperanton. Li cetere estis la unua de longa serio da reformatoroj, kiuj esperis akceli la triumfon de Esperanto per enkonduko de plibonigoj, unuj pli definitivaj ol la aliaj. Beaufront-Couturat sekvis Trompeter, von Wahl sekvis Beaufront, A. Gode sekvis von Wahl, kaj tiujn sekvis kaj sekvas la kohorto de la senĉapeligistoj, kiuj persiste prilaboris rebakadon de la vortaro,

dum, malantaŭ ilia dorso, la fabrikantoj de komputiloj disponigis al sia klientaro ĉiujn diakritajn signojn.

Kaj ĉu necese aludi la personajn konfliktojn, kiuj neniam mankis inter la "pacaj batalantoj", kaj finfine malebligis, ke la centjariĝo de la lingvo estu celebrata en unu sola festivalo.

Kaj tamen ĉiujn tiujn krizajn horojn ni supervivis, tamen tiun centjariĝon ni atingis; kaj tion — kion oni povus kredi miraklo — ni ŝuldas al du esceptaj faktoroj.


Unue la silenta fido de la granda plimulto de la esperantistoj al la leciono kaj ekzemplo de Zamenhof, kiu sciis de-

teni sin kontraŭ ĉia tento plibonigi tiun aŭ alian detalon de sia verko, tiel konvinkita li estis, ke por iu ajn lingvo la **kontinueco** kaj la **unueco** "estas multe pli necesaj, ol ĉiu ŝajna aŭ eĉ vera perfekteco" (PVZ, VIII, p.170). Tion neniam forgesu niaj posteuloj, kaj ili gardu al Esperanto la ekvilibron, kiun ĝia iniciatoro donis al ĝi, jam en la "Plena Gramatiko" de 1887, inter la du eksceso de memstarismo kaj de naturalismo.

Due la sento, pli aŭ malpli konscia laŭ la temperamentoj, ke la komuneco de unu neŭtrala lingvo donas al ĝiaj diversnaciaj parolantoj kontentigon de tiu deziro pri malfremdiĝo, pri altiriĝemo, kiu dormetas funde de la homa koro, ĉu oni nomas ĝin karitato, frateco, filantropio, solidareco aŭ, kiel Zamenhof, homaranismo. Estas facile al realistaj spiritoj ironii pri la "interna ideo": ili tamen atentu, ke la malsukceso de la ceteraj

projektoj de Lingvo Internacia estis grandparte ŝuldita al la skeptika aŭ malamika sinteno de iliaj aŭtoroj kontraŭ tiu afekcia aspekto de la problemo. Kaj ili ankaŭ konsideru, ke tiu aspekto alprenis pli kaj pli da graveco en mondo submetata al la konstanta minaco de satelitaj atombomboj.

Certe, la Esperanta mondo povas fari malmulton por kuraci tian angoron, sed tiun malmulton fari estas nia devo, kaj, kiom eble, per tia penado iel partopreni en la beno, kiun antikva majstro promesis al la pacigantoj.



Tost! Super la manuskripto de PIV, jubila gesto de nia ĉefa lingva korifeo perfektas por feste malfermi ĉi tiun Jubilean Numeron.

Tri celoj por komenci la duan jarcenton

(el parolado en la sveda jubilea kongreso, represita en la Kongresa Libro por la Jubilea UK en Varsovio)


...Se oni metas la modernajn kaj aktualajn demandojn, kiujn ni nun frontas, apud la ideojn de Zamenhof de antaŭ cent jaroj, oni vidas, unue, ke liaj ideoj restas freŝaj kaj aplikeblaj; kaj due, ke ili eĉ donas la bazon de konstruebla laborplano por la komenco de la dua jarcento de nia lingvo. Ĝin oni povas fokusiĝi je tri ĉefaj demandoj: instruado de la lingvo, utiligo de la lingvo, ĝeneraligo de la lingvo.

La instruado de la lingvo estas esenca antaŭkondiĉo de floranta Esperanto-movado. Tio devus esti tiel memevidenta, ke ne necesus eĉ eldiri ĝin — sed la realo estas, ke ni ne sufiĉe utiligas nian komunikreton, niajn organizaĵojn, niajn kongresojn, niajn eldonaĵojn, por la baza tasko de instruado. Esperanto-movado ne povas ekzisti sen esperantistoj: estas nia tasko krei ilin.

Post instruado, venas utiligo de la lingvo: por ligi nin pli bone en komuna agado, por streĉi kaj fortigi la lingvon mem, por entuziasmigi niajn anojn kaj konvinki ilin pli forte kaj aktive subteni kaj partopreni la agadon. Ni devas elpaŝi nian troan eŭropismon, venki niajn internajn diferencojn; per utiligo ĝui la lingvon de Zamenhof kaj uzi ĝin por ĝiaj intencitaj celoj.

Fine, ni devas labori por la ĝeneraligo de la lingvo — utiligante la Jubileon kaj la Unesko-rezolucion, la modernan teknikon kaj ĉiujn aliajn eblajn rimedojn por atentigi la mondon pri la rimarkinda fenomeno Esperanto. Se ni volas bone labori por tiu disvastigo, ni devas pli bone plani nian strategion, realigi niajn taktikojn.

Kaj en ĉio ĉi ni memoru tion, kion oni menciis, pri la fideleco de niaj membroj. Ni ne tro misuzu tiun fidelecon, sed respektu ĝin, samtempe respektante unu la alian, kaj respektante la motivojn de niaj kunlaborantoj. Zamenhof revis pri mondo de homaranoj — unuopuloj, kiuj estas samtempe parto de kolektivo. La esperantismo estas ligo inter niaj unuopaj espero kaj tiu kolektiva volo.



"Antaŭen!" Plene en sia rolo, la Prezidanto de UEA fiksas la rigardon al la estonteco...

INTERNACIA BIBLIO-MISIO

Per la internacia lingvo donis D-ro Zamenhof
l'esperon al la homoj de la mondo.

Li ankaŭ tradukis la Malnovan Testamenton
de la Sankta Biblio

En la Sankta Biblio troviĝas la vera espero pri
la estonteco — la bona novaĵo pri la intenco
de Dio rilate al la tero kaj la homaro.

Vizitu nian budon ĉe la Varsovia Kongreso
por vidi Esperantajn Bibliojn, stud-kursojn
kaj literaturaĵojn. Aŭ por senpagaj libretoj
skribu al:

**Internacia Biblio-Misio, 29 Plantation Road,
Poole BH17 7LN, Britujo (se ekster Eŭropo,
al P.O. Box 373, Boronia 3155, Aŭstralio)**

"Per LOT iru al Varsovi", sed... kiel la patriarko
LOT lasu vin ebriiĝi de **La Kancerkliniko!**"

5 n-oj 85FF, **J. Le Puil**, 5 Pl. Lavoisier (61), 93380
Pierrefitte, Francio. Pĉk 12 729 73 X, aŭ UEA klik-g.

Aleksandr D. Duliĉenko (Sovetunio):

Cent jaroj provizis unikan modelon por la ĝenerala lingvistiko

En lingvistiko Esperanto ĉiam elvokis diskutojn kaj diversajn opiniojn. Tiu situacio havas pozitivan signifon, ĉar argumentojn "kontraŭ" ordinare refutis praktika uzado de la lingvo mem kaj la pozicio de Esperanto des pli fortiĝis. Komence de la 20a jc. famis unu el la akraj diskutoj inter la mondominenta lingvisto Jan Baudouin de Courtenay kaj liaj oponentoj A. Leskien kaj K. Brugmann. Baudouin de Courtenay konvinke argumentis, ke la problemoj de internacia racia (konstruita) lingvo kaj precipe de Esperanto devas esti envicigita inter fundamentaj problemoj de la lingvistiko. Li asertis, ke alvenos tempo, kiam en universitatoj de diversaj landoj estos fondataj katedroj de internacia lingvo kaj literaturo. Nun, kiam Esperanto pruvis sian "lingvan forton", fariĝinte unu el la helpaj internaciaj iloj de komunikado, estas grave respondi al la demando: kion Esperanto signifas por la scienco pri lingvoj, kiu ne ĉiam "dorlotis" ĝin (sufiĉas memori, ke ekz. en konataj lingvistikaj vortaroj ni ne trovas la terminon "esperantologio" — disciplino okupiĝanta pri ĉiuj aspektoj de Esperanto). En ĉi tiu malgranda artikolo ni turnas nin al nur kelkaj aspektoj.

Esperanto estas unika modelo por kontrolo kaj profunda pritrakto de multaj ĝenerallingvistikaj ideoj. Esperanto per si mem montras la procezon de naskiĝo kaj estiĝo de lingvo, vere "antaŭ niaj okuloj". El la 16 reguloj de ĝia dupaĝa gramatiko, per procezo de socialigado, funkciado kaj evoluo de la lingvo, rezultis 436 paragrafoj de *Plena analiza gramatiko de Esperanto* sur 600 paĝoj. Komence la zamenhofa radikaro havis pli ol 900 radikojn, en 1905 ĝi havis jam 2600, en 1914 — 4000 kaj en 1970 *Plena ilustrita vortaro de Esperanto* enhavis 16 000 radikojn. Esperanto evoluis de lingvistika konstruaĵo kun ĝeneralforme esprimita projekta gramatiko ĝis socilingvistika sistemo plenumanta la samajn funkciojn karakterizajn por etnaj skribaj lingvoj. Tio donas por la lingvistiko eksterordinaran eblecon paŝon post paŝo observi etapojn de la evoluo kaj perfektigo de ĉiu lingva subsistemo — fonologio, morfologio, sintakso, leksiko, vortfarado — kaj la evoluon de lingvo ĝenerale.

Per Esperanto estis kontrolitaj kelkaj lingvistikaj leĝoj, sen kiuj oni supozas nebla la ekzistadon de lingvo mem. Esperanto montris, ke ekz. la dekomence deklarita principo "unu vorto — unu signifo" estas plene nerealigebla, ĉar aktiva "viva" funkciado de lingvo postulas multsignifon de vortoj, evoluon de sinonimeco, pli heterogenajn esprimformojn de antonimaj rilatoj ktp, t.e. por Esperanto kiel ankaŭ por ĉiu etna lingvo necesas ne nur principo de lingva sufiĉo, sed ankaŭ principo de lingva superfluo. Pri tio skribis jam en 1931 la konata soveta interlingvisto Ernest Drezen en sia verko *Skizoj pri teorio de Esperanto*.



La socialigado de Esperanto, al kio de la komenco helpis Zamenhof mem, estas modelo de kolektiva kreado en lingvo. La lingvistika tipologio povas multon prunti el la fakto, ĉar ankaŭ etnaj lingvoj estas produktoj de kolektiva kreado fare de iliaj parolantoj. Precipe por la teorio de lingvaj universalajoj Esperanto mem estas modelo. La lingvistika tipologio trovas en lingvoj de la mondo plej ĝeneralajn, universalajn aŭ invariantajn signojn kaj kategoriojn — kaj en Esperanto multo el tio estas praktike realigita. En la pola lingvo substantivo havas sep kazojn, en la rusa — ses kaj en la hungara

La Edinburgh Prelegoj pri Mensa Scienco


de Thomas Troward

mortinta divizia juĝisto, Punjab, Hindio

El la amaso de filozofiaj libroj en Esperanto, la verko de Thomas Troward estas la sola, laŭ mia scio, kiu traktas la diferencon inter la indukta kaj dedukta rezonado, kaj ties rilaton inter la objektiva kaj la subjektiva mensoj. Kiel regi vian propran vivon, kaj sekve vian destinon, estas la celo de Mensa Scienco.

Havebla de la Libroservo de UEA, prezo 21 gld., aŭ de la tradukinto/eldoninto Elwyn C. Pollock, P.O. Box 732, Morongo Valley, CA 92256, Usono, prezo US\$7.

BRUSELA ESPERANTO-CENTRO



☎ 00 32 (0) 2 538 71 66

- Avangarda Esperanto-agado en la babela Eŭropa ĉefurbo
- Sidejo de Monda Turismo – Eŭropa Esperanto-Centro – Belga Esperanto-Federacio – Brusela Esperanto-Grupo
- Ĉiam internaciaj etoso kaj renkontoj
- Situantaj en kvietaj kvartaloj tuj ĉe la malnova urbometrostacio Luizo (**Schotlandstr. 73, 1060 Bruselo**)
- Celo de pluraj Esperanto-buslinioj el Orient-eŭropo
- Loĝebleco laŭ Pasporta Servo aŭ en apartamentetoj kaj perado de hoteloj de 700 ĝis 7000 bfr. (nur tranokto)
- Bona elfluĝejo por via eŭropa vojaĝo

Konto: 001-1762306-86 Esperantotur Bruselo

— nur ĉefajn 16! La signifo de ĉiu kazo estas esprimita per aparta fleksio. En Esperanto, se paroli strikte, estas nur unu kazo — akuzativo, esprimita per speciala elemento; aliajn kazajn signifojn esprimas prepozicioj. En la franca lingvo verbo havas ses formojn de pasinta tempo — neperfektan (imparfait), simplan (passé simple), kompletan (passé composé), delongepasintan (plus-que-parfait), antaŭantan (passé antérieur), rektan (passé im-

médiat) — en Esperanto ĉio estas reduktita al unu formo. Invarianta modelo de Esperanta gramatiko prezentas eblecon juĝi pri profundaj kaj supraĵaj, pri esencaj kaj periferiaj signoj en lingvo. La principo de Esperanta kombino en konstruo de gramatikaj formoj kaj precipe en vortfarado povas esti uzata en teorio de terminologio, en konstruo de novaj termino-

Lingvistika profesoro ĉe la renomata Universitato de Tartu en Estonio, A. Duliĉenko movade elstaras pro sia redaktado de Interlinguistica Tartuensis, unu el la plej gravaj revuoj en tiu kampo. En la redakta komitato kunlaboras i.a. Paul Ariste, la pinte eminenta finn-ugra lingvisto kiu estas ankaŭ membro de la Honora Patrona Komitato de UEA.

sistemoj en diversaj sferoj de la scienco kaj tekniko.

Esperanto kreis tute specifan socilingvistikan situacion por la mondo: uzata kune kun etnaj lingvoj kiel internacia rimedo de komunikado, ĝi kreis neordinaran por nia mondo dulingvismon (gepatra lingvo kaj neŭtrala lingvo) kaj neordinarajn formojn de lingvaj kontaktoj (gepatra lingvo kaj Esperanto ĉe unu homo). Per la ekzemplo de Esperanto la lingvistiko havas belan eblecon esplori la delongan kaj komplikan problemon de socia rego ne nur super apartaj subsistemoj, sed super lingvo ĝenerale. Siatempe E. Drezen ĝuste opiniis, ke prognozato pri la ĉefaj vojoj de lingva evoluo de la homaro, pri kio lastatempe la lingvistiko aktive okupiĝas, devos konsideri la sperton akiritan per Esperanto.

En 1906, kiam Esperanto estis nur en "juna aĝo", profesoro de odesa universitato Aleksandr Tomson demandis: "Kaj kiu parolos aŭ skribos Esperante post kvin jaroj?" En la demando estas respegulita ĝenerala skeptikismo de la lingvistiko rilate al internaciaj konstruitaj lingvoj. Nun, kiam je la vorto "Esperanto" elvokiĝas 100-jara historio, originala Esperanta literaturo, dekoj da naciaj organizaĵoj kaj UEA mem, pli ol 130 periodaĵoj, 15 disaŭdigaj stacioj, ĉiujaraj Universalaj Kongresoj ktp, la demandon en tiu formo ne metas eĉ unu lingvisto.

William Auld (Britio):

Pensoj okaze de la 100-jara Jubileo de Esperanto

Cent jaroj — plej mirinda el mirakloj:

Planita lingvo, kiun oni uzis
Tutmonde, malgraŭ moko kaj obstakloj,
Spite al spitoj, kiuj ĝin rifuzis;
Tra krizoj kaj militoj kaj masakroj,
Kiam la mondo muĝis kaj meduzis —
Obstinis homoj, kvazaŭ en tranĉeo,
Pri la interna lingvo de l' ideo.*

Licas scivoli kial. Kial vivas

Ĉi tiu "neeblaĵo" (laŭ ekspertoj),
Kiu nek velkis for, nek primitivas
Konforme al malico de asertoj
De kontraŭuloj, sed plu efektivas
Kaj varme verdas, kiel en dezertoj
Oazoj logas per fortiga sorĉo
Kaj donas akvon por soifa gorĝo?

Ĉar vidu: preter limoj de landkartoj,

Malsimilecoj rasaj kaj kulturaj,
En ĉiuj teranguloj kaj mondpartoj,
Eĉ kontraŭ (foje) leĝaj kaj cenzuraj
Malhelpoj kaj eĉ malpli bonaj fartoj,
Troviĝas ĉiam iuj pli maturaj
Individuoj — eĉ en kelka kvanto —
Al kiuj hele lumas Esperanto.

Tio do estas la mirinda fakto,

Kiun ne povas skeptikul' forviŝi:
Ke ne sukcesis moko kaj mistrakto,
Nek provoj nian tezon subtapiŝi,
L' adeptojn trompi. Kun aŭ sen kontakto,
La veron pli konservis ili-iŝi,
Ke estas rajto de l' homar' surtere
Komunikiĝi rekte kaj libere,


Kaj tio eblas nur per la neŭtrala

Kaj celkonforma lingvo de l' Espero,
Kiu ne estas reva, sed reala.
Aliaj lingvoj — jen la simpla vero —
En fremda buŝ' tendencas al banala
Kliŝripetado, parolmaniero
Kiu ne adekvatas al konceptoj,
Kaj misprononc' agaca. Kun esceptoj

Tre, tre maloftaj, specialaj kazoj.

Ni ne kontraŭas tion, sed nin ĝenas —
Nin, pli postulajn — tiaj parafratoj.
Ni volas lingvon, kiu ne katenas,
Taŭgan por vivaspiroj kaj ekstazoj;
Kiu ne simple kodas, sed vivplenas;
Per kiu diri tion, kio gravas
En mondo de la homoj. Ni ĝin havas.

*Dankon, Helmut Welger! (*Esperanto*, dec. 1982, p.206)



Oni eble bezonus bibliotekon por detaligi la movadajn meritojn de Auld. Poete, tradukiste, redaktore, eseiste, li vaste kontribuis al la Esperanta kulturo. Jam tridek jarojn La infana raso okupas la pintan lokon en nia originala literaturo.

Ne kulpas, lasence, kontraŭantoj.
Mem la koncepto ŝajnas fantazia
Al menso tro ligita inter vandoj
De superstiĉo kaj prestiĝ' nacia;
Ĝi lezas firmon de l' animorandoj
Se oni kroĉas sin al malracia
Prafonta suspektemo al fremduloj,
Rezisto timoplena al stimuloj.

Sed kiu timas, tiu jam mensogas:
Videblan atestaĵon oni neas.
Per klaraj malveraĵoj oni mokas
Kaj leĝojn de l' scienco malobeas.
Tia konduto triviala ŝokas,
Sed pravas, ke ni same Galileas
Kiel kreinto de la teleskopo,
Kiun simile trafis malaprobo.

Ne temas plu pri teorioj, fakte:
La lingvo pruvis siajn uzkapablojn,
Kaj kiu volas trakti ĝin abstrakte
Ne rajtas plu ignori inkunablojn,
Nek tradiciojn, kiujn ni barakte
Konstruis tra jarcento. La probablojn
De l' "Fina Venko" oni ja diskutu —
Sed pri l' reala fenomen' ne mutu.

La "Fina Venko" — ĉu mi risku diri? —
Ne tute urĝas, eble ne necesas...
Ho jes, ni rajtas daŭre ĝin deziri,
Kaj nia... instigado... ja ne ĉesas
(Ho certe, kompreneble); sed elŝiri
Al si la harojn se ni ne sukcesas
Varbi la tutan mondon estus troe
Dum mem la lingvo marŝas plu heroe!

Ĝi marŝos plu. Pri tio garantiis
La sperto de cent jaroj. Pensu nure:
Modesta ĝi naskiĝis; pri ĝi sciis
Malmultaj, ĝi lanĉiĝis sentambure;
Kaj tamen tra la mondo disradiis...
Senteblan truon ŝtopis ĝi nature;
Se nun ĝi malaperus postjubile,
Ĝi lasus nur la truon, senŝtopile.

Mi ĝin aludis ĉiam personige:
Granda eraro, kiun multaj kulpas!
Tia figur' efikas misnavige —
Nek homas ĝi, nek aglas, tigras, vulpas!
Ĝi estas ilo, "vivas" nur aplike —
La homoj ĝin manovras aŭ uzurpas:
Sen interveno de la homa cerbo
Ne povus ĝi funkcii kun superbo.

Denove la miraklo — ke ne mankis
La homaj fortoj dum jarcento tuta;
Al Esperanto donis sin, eĉ sangis
Aŭ martiriĝis iam sub la brutaj

Subpremo, kiam ŝovinism' lavangis
Kaj regis sovaĝeco persekuta,
Centmiloj, kiuj vidis la vizion
De mondo atinginta harmonion.

Se tia cel' naivas, tiel estu:
Naivaj estis multaj homaj celoj.
Prefere ion celu ni, ol bestu!
Diabloj ni ne estas, nek anĝeloj,
Sed kontraŭ maljustaĵoj ni protestu!
Ni estas ne senvoĉaj bagateloj...
Pri lingvo ĉiam regas emocio —
Tion instruas nia historio.

Kaj tion niaj kontraŭuloj pravas
Eĉ sub mantelo de logikaj ŝajnoj;
Ne eblas diri nur, ke ili blufas,
Se ili ne agnoskas pri la gajnoj
De Esperanto; sed malam' Vezuvas
(Eĉ se ĝi ne eruptas dum semajnoj):
La emocia lafo submurmuras,
Kaj, frida, sur la montoflanko duras.

Ne diru, ke l' poeto paranojas.
Pripensu nur la Ligon de Nacioj —
Similaj sabotadoj tro multfojas
(Memoru pri la UNO-peticioj!).
Ofte fadenon de l' Esper' ĉizojas
Unuopuloj kun filozofioj —
Se ĝusta vorto — kies prem' konvinkas,
Ke gefrateco de l' homaro... stinkas.

Pri tio jam sufiĉas. Ĉimomente
Indas omaĝi al la pioniroj
Kaj ĉiuj antaŭuloj ĉiugente
Kontribuinta al antaŭeniroj
De nia karavano. Elokvente
Atestas pri justeco de l' aspiroj
Ilia sindonemo. Ni ja riĉas:
Se falas unu, dua jam leviĝas.

Eble forpasis jam la Majstrotagoj,
Eble la verdaj steloj arĥaikas?
Negrave! Plu necesas firmaj agoj —
Ĉar vidu, homoj, nia cel' unikas
(Ni diru ĝin sen honto kaj sen blagoj):
Ian homaranismon ni praktikas,
Eĉ ne perfektan, eble ne konscian...
Komuna lingvo havas kernon tian;

Sen ĝia sento estus morta kodo
Aŭ nura temo por diskuto luda
(En histori', malgrava epizodo
Aŭ filozofiaĵo senkonkluda)
La lingvo de ĉi tiu festa odo
Kaj ĝia rava esprimivo tuta!
Pro ne plu nova, sed eterna, sento
Ĝi vivis kaj riĉiĝis dum jarcento!

La unueco de Esperanto: esenca rolo de la Akademio


La rolo de la Akademio de Esperanto estas difinita en la unua artikolo de ĝia statuto per formulo sufiĉe ĝenerala: *konservi kaj protekti la fundamentajn principojn de la lingvo kaj kontroli ĝian evoluon*. Sed tiuj fundamentaj principoj nenie estas konkrete troveblaj: apartenas al esperantologoj elserĉi, studi kaj difini ilin. "Kontroli la evoluon" estu komprenata, kiel "konstati" kaj "esti preta agi", se io ne ŝajnas en ordo.

La 12a artikolo de la statuto estas pli instrua: ĝi difinas ses eblajn taskojn. **1** — *esplori ĉiajn lingvajn demandojn, kiuj koncernas Esperanton*, sed tio koncernas la tre vastan kampon de Esperantologio; **2** — *verki vortaron de Esperanto kun difinoj en Esperanto*, sed tio estus reverki la Plenan Ilustritan Vortaron kun la peza ŝarĝo, kiun kuntrenus 45 egalaj kaj voĉdonantaj Akademianoj, vid-al-vid de la hierarkia sistemo de redakta stabo el fakuloj kun unu ĉef-redaktoro; **3** — *verki teknikajn terminarojn aŭ kontroli kaj aprobi tiajn terminarojn verkitajn de aliaj aŭtoroj*, sed tio necesigus, ke multaj universitataj profesoroj aŭ similaj kompetentuloj kandidatu kaj elektiĝu; **4** — *revizii aperintajn verkojn kaj kritiki ilin el lingva vidpunkto*, sed tio supozus, ke la ordinare tre okupitaj Akademianoj donu sian tutan tempon al la verkoj de aliaj; **5** — *doni premiojn al la aŭtoroj de la plej bonaj aperintaj verkoj*, kio estis efektive farita dum mallonga periodo inter la du mondmilitoj; mi nun esperas, ke baldaŭ ni tion povos refari post starigo de asocio de "Amikoj de la Akademio", kiu interalie helpos nin pli enspezi ol ĝis nun; **6** — *defendi*

Esperanton kontraŭ konkurencaj sistemoj de lingvo internacia; tion oni iam faris ĉefe kontraŭ Ido, kiu forpasis per natura morto. Sed hodiaŭ la sola "konkurenco" venas de potenca kaj ĉiea lingvo..., kiu ŝajne eĉ ankoraŭ ne rimarkis, ke ni povus konkurenci ĝin...! Vere, ja lukto de David' kontraŭ Goljat'!

Tiuj multaj sed-oj nur tradukas la bone konatan virton de ĉiuj kaj ĉiaj statutoj: ili antaŭvidas multajn eblajn kaj eventualajn taskojn; tiujn oni malofte elfaras; ĉiuokaze neniam ĉiujn samtempe. Ili estas tie enskribitaj nur por ke agema kaj inteligenta Estraro rajtu "laŭ la statuto" proponi taskon, kiun ĝi trovas utila en difinita momento aŭ cirkonstanco.

Sed, se funde esplori la aferon, oni alvenas antaŭ jena demando: "kio estas grava kaj esenca?" Mia respondo estas: "Ja la unueco de la lingvo!" Defendi la fundamentajn principojn de la lingvo, aŭ pli konkrete la Fundamenton estas finfine nur rimedo por teni tiun unuecon. Sed ĉiu konscias, ke tiu dokumento ne donas kaj ne povas doni ĉiujn detalojn de nia lingvo, precipe ne en ties hodiaŭa stato. Kaj se estas permesite preni ankoraŭ iom brulantan ekzemplon, mi diros, ke la Fundamento, tiu nia leĝa dokumento, nenie enhavas la evidentan dekreton, ke ĉiu esperantisto uzu la participojn laŭ la "aspektismo", kaj ke paralele la tiel nomata "tempismo" estu konsiderata kiel eraro.



Bahaa Adorejo, New Delhi, Hinda Unio



Bahaa
Esperanto-Ligo

B.P. 60
L-4401 Belvaux
Luksemburgio

La tutmonda Bahaa Komunumo sincere gratulas
la Esperanto-movadon okaze de ĝia centjara jubileo

Por komprenigi la fundon de mia penso, mi tre resume rakontos la debaton, kiu okazis post mia prelegserio kaj pri la sama partecipa temo en la Kultura Semajnfino organizita de la Sarlanda Ligo*. Iu leviĝis kun la demando: "Kial la Akademio elektis la sistemon A?" — "Ĉar la Akademianoj post studado kaj pripenso opiniis, ke ĝi plej bone respondas al la lingvo kaj al la uzado de Zamenhof kaj de la 'bonaj aŭtoroj'!" — "Tamen la sistemo T estus pli bona por ni, ĵusaj lernintoj!" — "Eble por vi, en via lando! Sed certe ne por ĉiuj ĵusaj lernintoj: por treege multaj el ili la sistemo A estas pli bona, pli evidenta! Sekve, mi petas vin, klopodu por kompreni, ke se la Akademio anstataŭ A elektus T laŭ via deziro, hodiaŭ povus okazi ĝuste la sama debato, en kiu oni riproĉus al la Akademio, ke ĝi elektis T, dum A estas pli facila!"



La nuna prezidanto de la Akademio, André Albault, kaj la Lingva Komitato de 1907: 80-jara eksperimento en la evoluado de planlingvo. Eble eĉ UEA ne spertis tiom da internaj kaj eksteraj bataloj, kiel nia supera lingva aŭtoritato!

Envere la Akademio post bona pripenso elektis ion kaj oficiale anoncis sian elekton. Kaj punkto fino! Ĉiu komprenanto kaj ĉiu defendanto de la unueco de nia lingvo lojale kaj fidele atentis la verdikton de la Akademio; li ankaŭ atentigos aliajn.

Efektive ĉiu ajn detalo de la lingvo favoras jen tiun nacion, jen tiun ĉi, sed per la forto de la aferoj mem malfavoras aliajn. Tio signifas, ke por nia komuna lingvo ĉiu el ni devas elporti sian parton de la ŝarĝo. Unueco firmiĝos nur laŭ la preteco de ĉiu pagi tian prezon!

La Akademio ne sendos ĝendarmojn al la ne-obeantoj: ĝi ne havas ĝendarmojn. Ĝi ankaŭ ne uzos inkviziciajn metodojn por trudi siajn decidojn: ĝi ne ŝatas tiajn metodojn! Sed ĉiu lojala esperantisto, asocio aŭ institucio mem obeos tiujn decidojn. Finfine kaj esence, en kiu ajn lingva afero tute ne gravas, ĉu oni sekvu la vojon n-ro 1 aŭ la vojon n-ro 2! Gravus nur, ke ni ĉiuj sekvu la saman vojon. Nur tiel eblas konservi la unuecon.

Ja! Ĉagrenaj spiritoj eble bedaŭros, ke en ĉiu tia afero, dum unuj estos kontentaj, aliaj estos grumblemaj, ĉar troviĝos, ke ili jam adoptis alian pozicion kaj do devos modifi ĝin. Ĉi lastaj konvinkiĝu, ke la decido ne estis alprenita kontraŭ ili, ke ili neniel malmeritis, sed ke la decido celis nur la bonon kaj unuecon de la lingvo. Jen la plimulto estos favorata, jen favoriĝos la superaj principoj de Esperanto. Ĉiam gajnos la unueco, ĉiam gajnos la lingvo! Ili do akceptu tion kun sportema spirito: alian fojon, en alia okazo, ili "pravos" kaj antaŭiros la decidon Akademian...

En tiaj lingvaj aferoj neniuj individuo povas trudi sian opinion. Plej ofte la lingvo evoluas per si mem: neniuj bezonas interveni, eĉ ne la Akademio. Sed kelkfoje povas okazi konflikto: ne ĉiuj komprenas punkton de sintakso, ĝustan signifon de vorto aŭ alian trajton de la lingvo en la

sama maniero. Stariĝas du tendaroj malamikaj kaj koleraj inter si, kvazaŭ ne ekzistus la ekstera mondo ĉirkaŭe, kvazaŭ ekzistus nur la problemoj kaj la evidenta solvo "nia", krom la alia solvo, "ja stulta, nelogika, neracia". Ĉiuj tiam komprenas, ke nur la Akademio povas decidi pri la ĝusta kaj oficiala solvo. Nur lingva aŭtoritato post longa studado kaj pripenso povas indiki la sekvotan vojon: kiu pro difino estas la vojo al unueco. Dube, ĉu ekzistas alia rimedo!

Kompense tio postulas, laŭ mi, la neceson starigi dialogon inter la Akademio kaj interesitaj personoj, asocioj aŭ organismoj. Tiuj povas esti pedagogoj kaj esperantologoj, instruantoj kaj verkistoj: unuvorte ĉiuj ĉi, kiuj interesiĝas pri Esperanto kiel lingvo kaj volas ĝin flegi. Inter la asocioj kaj organismoj privilegian lokon ricevu la landaj Esperanto-institutoj, kiuj ne nur kontrolas la ekzamenojn en sia lando, sed ankaŭ ĉiel flegas la uzadon de nia lingvo ĉe siaj samlandanoj. Tiaj institutoj unue devus stariĝi apud ĉiuj landaj asocioj, kiuj ankoraŭ ne havus ilin; kaj due ili devus fariĝi la plej eminentaj interparolantoj kun la Akademio. Ankaŭ pro tio ni esperas la baldaŭan starigon de speciala asocio de "Amikoj de la Akademio": ĝi eldonos periodaĵon *La letero de la Akademio* kaj donos al nia lingva institucio la rimedojn, kiuj kruele mankas al ĝi por plenumi la taskojn, kiujn ĝi alfrontos en tiu dua jarcento jam komenciĝanta.

Ha! Kiel saĝa estis Zamenhof, nia mentoro, kiam en 1905 li proponis la bazon de organismo, kiu poste fariĝis la nuna "Akademio de Esperanto". En tiu momento la aŭtoro de *Lingvaj Respondoj* demetis de si la gvidposton, la gvidpotencon, kiun li okupis malgraŭ si, kaj li transdonis ĝin al multkapa institucio, kiu iom post iom trovis sian vojon. Tiu profunda psikologo ja sciis, ke "tiom da ĉapoj, kiom da kapoj"!

* A. Albault, *Naŭ Prelegoj pri la Fundamento*, eldonota en 1987 de Sarlanda Esperanto-Ligo. (La debatoj estas reproduktitaj en apendico post la prelegoj, dank' al magnetofona registrado.)

Kiel redakti kolektivan libron en Esperant(uj)o?

Redakte prilabori unuecan presmanieron de kolektiva libro en Esperanto, kiam ĝiaj aŭtoroj loĝas dise sur ĉiuj mondpartoj kaj kutimiĝis al uzado de siaj establitaj prestradicioj, ne estas facila tasko. Tion mi ree-kaj-ree profunde spertis, kiam la universitato de La Laguna petis, ke mi zorgu la korespondadon kun la aŭtoroj kaj kunhelpu senerarigadon de la presprovaĵoj por la dua volumo, "Esperantismo", de la *Serta**, ĉar inter la membroj de la Eldona Komisiono estas neniue esperantisto.

Esperanto ankoraŭ ne atingis tian gradon de unueco, kiel la naciaj lingvoj, rilate sian ortografion. Zamenhof parolis pri **internacia ortografio**, sed tiu sintagmo signifis por li nur ortografion formulitan per la Esperanta alfabeto (**internacia = Esperanta**). Sed kio, ja, estas internacia, Esperanta ortografio? Laŭ miaj spertoj, unue kiel edoninto de la kanariaj Stafeto-libroj, kaj nun, jam dirite, kiel kunhelpanto pri la editorado de la volumo "Esperantismo" de la menciita *Serta*, Esperant(uj)o ne posedas norman, sisteme aranĝitan, unuecan ortografion. Esperant(uj)o ĝis nun havis — kaj plu havas — nur hazardan, empirie ĥaosan, anomalian ortografion, apogitan sur disaj malsamaj modeloj nacilingvaj. Grandtrajte la faktoj prezentigas jene:

**Serta gratulatoria in honorem Juan Régulo*, trivoluma verkego eldonata de la universitato de La Laguna lige kun lia emeritiĝo.

Laŭ siaj nacilingvaj tradicioj/konvencioj, esperantistoj el landoj kun ĝermanaj (kaj parte francaj) skribkutimoj majuskligas tre abunde en titoloj de verkoj, en gentaj kaj geografiaj nomoj kaj adjektivoj, kaj simile. Ĝenerale anglalingvaj kolektivoj majuskligas la inicialojn de ĉiuj semantike signifoplenaj (t.e. eksterpartikulaj) vortoj de libro-, gazeto-, artikol-, subĉapitro-titoloj; kvankam ne ĉiuj tion faras: ĉefe — sed ne ekskluzive — multaj tion ne praktikas en la anglalingva Ameriko. Paradigmojn pri majuskligado laŭ la angla sistemo prezentas *Esperanto en Perspektivo*, ĉefredaktita de Ivo Lapenna (komparu plurloke, sed, por ekzemploj, paĝojn 72, 74, 132, 280-281 ktp); dum pri modera uzado de majuskloj atestas la libro *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto* de John Wells (vidu la titolojn de la subĉapitroj kaj la bibliografion). Ambaŭ, Lapenna kaj Wells, estas internaciaj elstaruloj; ambaŭ, aldone, membroj de la Akademio de Esperanto. Kiu sistemo, do, pravas, kiu sekvindas, imitendas?

Latinidoj (hispanoj, italoj, portugaloj, rumanoj, svisoj...) majuskligas modere, dum francoj staras meze inter la ĝermana kaj la latinida konvencioj. Cetere ne ĉiuj tradicioj koincidas inter ĝermanaj, aŭ inter latinidaj, aŭ inter aliaj latinliteraj skribsistemoj: multaj havas apartajn nuancojn, trajtojn forte enradikiĝintajn. Rigardo en la historion ne prezentas decidan ateston, atentendan solvon, ĉar la antikvaj alfabetoj de lingvoj sanskrita, helena, latina ne diferencigis inter majuskloj kaj minuskloj, kaj



multaj alfabetoj de aliaj kulturaj lingvoj, kiel la amhara, la araba, la hana, la hebrea, la japana, la korea, la taja kaj aliaj ne distingas vortojn per apartformaj inicialoj: ili simple ne havas majusklojn, almenaŭ ne laŭ la eŭropa senco de tiu termino. Do neniuj sistemoj ja superas la aliajn.

Por redaktoro(j) de kolektiva libro en Esperanto la tubero kuŝas en tio, ke Esperant(uj)o, ĝis nun, ne formis al si unuecan skribmodelon. Tial multaj esperantistoj, sub la kompreno, ke Esperanto historie estas precipe eŭropa lingvo, naive paŭsas, senplue, siajn apartajn ortografiajn sistemojn, kiujn ili, nekonscie, konsideras ekskluzive pravaj, kaj sekve senkritike ilin eĥadas en Esperanto. Sed nun venas fundamenta demando: el la pluraj eŭropaj, kiuj sistemon imiti: ĉu la ĝermanan; ĉu tiun de la latinidoj; ĉu la manieron de la slavaj lingvoj, kiuj posedas latinliterajn alfabetojn; ĉu...? Eble pro ĉio supre dirita, japano ito kanzi konsekvence ekzilis ĉiujn majusklojn, des pli ke ili apenaŭ praviĝas laŭ la plimulto de la aziaj skribartoj, kaj neharmonias laŭ la malsamaj ŝablonoj eŭropaj.

La Eldona Komisiono, en mia universitato, senprobleme redaktis la unuan volumon de la *Serta*, laŭ redakta planizo, kiun ĝi antaŭaranĝis. Ĉar la aŭtoroj de la unua volumo estis, preskaŭ ĉiuj, eŭropedukitoj kaj en sia granda plimulto universitatanoj, t.e. homoj kutimiĝintaj al planizitaj laborsistemoj, ĉio fluis kontentige. Tial ni eksekvis la samajn ĝeneralajn rekomendojn de tiu redakto- gvidilo por la dua volumo. Sed tuj, post sendo de la unuaj presprovaĵoj, ni renkontis, alfrontis severan kontraŭstaron, ĉefe, kvankam ne ekskluzive, el aŭtoroj loĝantaj en ĝermanlingvaj areoj. Kial? Simple ĉar Esperant(uj)o havas neniun unuecan presrutinon, kaj tial la plimulto de la verkintoj reproduktis siajn proprajn skribmanierojn, kiuj al ili aperas kiel arĥetipaj. Kelkaj kontribuintoj tiel fervore ŝirmis siajn amatajn ĉevaletojn ortografiajn, ke ili preferis, eĉ formale proponis, repreni siajn pecojn antaŭ ol akcepti kriteriojn de la "redaktoretoj" (tiel!) de la *Serta*. Kiel solvi la problemon, ĉar ja la Eldona Komisiono havis je sia dispono neniun ĉiukontentigan "grandredaktoron"? Por meti finon al la dilemo, la Eldona Komisiono arbitraciis allasi la mikajn uzojn de la kontribuintoj, kiam ili senŝanceliĝe substrekis siajn preferojn. Nur pri *Esperanto/esperanto*, *Esperanta/esperanta*, *Esperante/esperante*, ĉar granda plimulto (pli ol 80%) tajpis majusklan inicialon, ni unuecigis al vortkomenca majusklo — je kio tamen kelkaj protestis! Sed la ĝisostaj decidiĝoj de feliĉe ne multaj aŭtoroj devigis la Eldonan Komisionon rekompости, tute aŭ parte, almenaŭ ĉirkaŭ dek artikolojn, plus multajn vortojn en aliaj, kun granda ekstra elspezo por la universitato. Ŝajne ne ĉiuj kapablas kompreni, ke eldonanto(j) de kolektiva libro, de revuo kaj simile devas antaŭe starigi unuecigajn regulojn, laŭ kiuj pluraj homoj povu pres- taŭgigi tajpotekstojn. Imagu, kio okazus, se kunlaboran-

toj pretendus trudi al *Encyclopaedia Britannica*, al *Dictionnaire encyclopédique Larousse* siajn ortografiajn marotojn!

Tiuj apartaj ĉevaletoj ŝanĝas kaj malharmoniiigas la tuton. Simile pri aliaj orto-/tipografiaĵoj. Ekzemple, pluraj postulis pli grandajn tipojn por eroj de siaj pecoj; kelkaj indikis preferajn lokigojn de subĉapitraj titoloj, unuj ĉe la dekstro, aliaj ĉe la centro, iuj ĉe la livo de la paĝokadro. Aldone estis vera ĥaoso ĉe paĝopiedaj bibliografiaj indikoj: ĉu citi per vok- aŭ per famili-nomo (ekz-e ĉu *Lazaro Ludoviko Zamenhof*, aŭ *Zamenhof*, *Lazaro Ludoviko*, aŭ simple nur *Zamenhof*?); ĉu meti unue eldonejon kaj poste eldonlokon, aŭ inverse (ekz-e *Plena ilustrita vortaro de Esperanto*, Paris, SAT, 1970, aŭ *Plena analiza gramatiko de Esperanto*, 4a eld., UEA, Rotterdam, 1980); ĉu uzi versalojn por aŭtoroj kaj citilojn por titoloj, aŭ kursivigi libro- kaj gazet-titolojn, aŭ prezenti nomojn de aŭtoroj kaj de libroj per tipoj egalaj al tiuj de la teksto; ĉu "Paris 1970" aŭ "Paris, 1970", kun komo aŭ sen ĝi? Ktp. Venis ĉiaj variantoj. Multajn tiaĵojn ni devis simple ignori.

Sed tamen por laŭeble eviti iritiĝojn al ĝisostuloj, ni multokaze fleksiĝis kaj rezignis niajn ĝeneralajn redakto- principojn. Tiel en la volumo aperas nepravigeblaj, el pres- arta vidpunkto, ortografiaj duoblaĵoj kiaj *Ĵaŭdo/ĵaŭdo*, *Marto/marto*, *Aŭtuno/aŭtuno*, *Nordo/nordo*, *S-ro/s-ro*, *Prof./prof.*, kiam aŭtoroj, ŝilditaj per la grandaj vortoj *libereco*, *libera evoluo*, *respekto* por ĉiuj kaj simile diktas ŝataĵojn. Ĉar kelkaj ilin ja arogante diktis! Tiamaniere la Eldona Komisiono, por forsavi pli grandajn damaĝojn, konscie cedis kaj, per sia cedo, iamaniere kontribuis bastardigi, hibridigi, fuŝi la tipografian arĥitekturon de la libro. Ja Esperantujo estas **alia!**

Pro kaj post la supraj konstatoj, venis al mi la ideo proponi al la Akademio de Esperanto starigon de komisiono, kiu redaktus malneton kun prezento de internaciaj, Esperantaj principoj, reguloj, gvidiloj, kiuj iel ordigus nian propran internacian ortografion. Ekz-e, ĉu *La Infana Raso*, kiel ĝenerale preferas britoj kaj sekvantoj de ĉi ties presarto? Aŭ ĉu *La infana raso*, kiel preskribas ĉeĥoj kaj aliaj latinliteraj slavaj ortografioj? Ĉu *La infana Raso*, kiel tiuj, kiuj kutimas majuskligi titolajn substantivojn sed ne adjektivojn? Ĉu *LA INFANA RASO* kiel tajpis kontribuintoj al la *Serta*? Troviĝis aliaj variantoj, kiel "*LA INFANA RASO*" t.e. citiloj, majuskloj kaj kursivigo! Ktp. Post redakto de tiu malneto, la Akademio ĝin submetus al diskutado de siaj membroj kaj, fine, al voĉdono. Post eventuala aprobo, la Akademio farus ĝeneralajn rekomendojn, devigajn por neniuj, sed tre forte rekomendindajn por starigo de propra, Esperanta skribtradicio, propra presrutino.

Jen, inter pluraj aliaj, kelkaj traktendaj eroj:

1. Pri majuskligo, aŭ ne, de inicialoj je signifaj (ne partikulaj) vortoj ĉe libro- kaj periodaĵo-titoloj: *La Infana Raso/La infana raso*, *La Brita Esperantisto/La Brita esperantisto/La brita esperantisto*.

2. Pri majusklado, aŭ ne, de moŝtaj kvalifikoj, titoloj: *S-ro/s-ro*, *D-ro/d-ro*, *Reĝa Moŝto/reĝa moŝto*, *Reĝa Majesto/reĝa majesto*, *Ekscelenco/ekscelenco*, *Dio/dio*

Kvankam de antaŭ kelkaj jaroj, la foto maldekstre bele harmonias kun la nuna artikolo! La eldonejo de prof. Régulo, Stafeto, inter 1952 kaj 1975 eldonis 94 librojn, inkluzive iujn el la plej gravaj verkoj en nia literaturo. Dum penado super preskaŭ 20 000 tekstopaĝoj, la demandoj ĉi tie starigitaj sendube venis ofte en la kapon. Ankaŭ ĉe ni revuaj redaktoroj ili abunde svarmas, kaj estas kun profunda sento de solidareco ke ni redaktis la tekston...

(en la biblia greklingvo *dio* ne havas inicialan majusklon, sed ja difinartikolon: *ho theós*), *Diablo/diablo* kaj simile.

3. Pri punktoj, aŭ ne, en mallongigoj. Por siaj artikoloj en la *Serta*, kelkaj eldevigis *k.t.p.*, kelkaj preferis *ktp*, multaj sin montris indiferentaj. Ĉu G.M.T. aŭ GMT por Grenviĉa Meza Tempo? Ŝajne granda plimulto tendencas al senpunktigado: UEA, SAT, IKU kaj simile. Ni memoru la komposto- kaj papero-ŝparan *k* de *PIV*.

4. Ĉu rekomendi, aŭ ne, uzadon de la etimologia *h* kaj skribi *aŭtoŭtona*, *psiĥo* ktp, aŭ daŭre allasi la nunan ĥaŭsan praktikadon, ĉe kiu kelkaj ekstremistoj pretendas rekte forigi la grafismon *h*, dum aliaj klopodas ĝin konservi, almenaŭ por grekdevenaj, hebrea kaj aliaj historiaj vortoj, kiel ekz-e *hitono* (Zamenhofa), *iĥtiokolo*, *ĥomero*, *ĥano*, *ĥmero*, *donkiĥoto*, *kolĥozo*, *jaĥto* (Zamenhofa), ktp.

5. Interpunkcio. Kelkaj verkistoj uzas komojn pli abunde ol la ĝenerala kutimo, imite de naciaj lingvoj, kiuj siavice imitas modernepokan latinon, ekz-e:

pro la intenco, dissolvi kaj transiri...

ne sufiĉas, enkonduki esprimon...

ĝi ne havos ŝancon, veni el la nuna...

dum aliaj uzas ilin ŝpare (ekz-e Makkink):


oni povas konstati ke pluraj aŭtoroj...

ne temas pri komencantoj kiuj ne regas...

trovu ekzemplojn kiuj montras ke la evoluo...

Ni troviĝas antaŭ preferoj, kiujn ĉiu siamaniere pravigas kontraŭ la, ĝenerale, malstabila uzado de komoj. Necesus laŭeble sistemigi normojn por ĝenerala praktikado. Cetere ĉefoj majuskligas post dupunkto, ĉar temas ja pri **punkto(j)**! En multaj landoj labilas, ĉu majusklo, ĉu minusklo post dupunkto, eĉ inter famaj verkistoj.

Kiel supre dirite, mi donas nur kelkajn ekzemplojn el inter multaj aliaj, kiujn oni povus facile kolekti kaj prezenti pri unuecigindaj disuzadoj. Reĝa Akademio de la Hispana Lingvo (aŭ, prefere, Reĝa akademio de la hispana lingvo?) ĉiam ekipas la sinsekvajn eldonojn de sia norma vortaro per oficialaj reguloj pri supervokalaj diakritiloj, pri interpunkcio, pri uzado de majuskloj, pri vortmallongigoj. Eĉ se la Akademio de Esperanto ankoraŭ ne eldonis ĝeneralan, norman vortaron por vasta publiko, ĝi tamen bone povus eldoni ortografiajn rekomendojn cele al jam tre necesaj ortografiaj unueco kaj konstanteco de nia skriblingvo: rutinan, formalan rimedon por korekta skribado, kiun ni devus respekti kaj ne disdegradi. Aldone direndas, ke ortografio ne estas, efektive, tiel eksterlingva formalaĵo kiel multaj el niaj korifeoj supozas aŭ pretendas. Ja establita, stabila ortografio enkorpiĝas en la lingvo ĉefe fonologiajn, sed ankaŭ simbolajn, historiajn, etikajn, pragmatajn, gramatikajn principojn.



Baldur Ragnarsson (Islando):

Koordinatoj

Finfine,
Esperanto estas persona sperto.
Ĉe mi komence antaŭ kvardek jaroj
en neloĝata valo
kies nom' aludas
glacion kaj riveron grizan
en vespero nebuleca

Sed la Nova Vorto
nete klaris,
sen ia ajn ornamo,
tamen nuanca strange
je devi' absurda:
"Rajdi sur leono estas danĝere!"

Spertinte tiun tuton
mi malfermis la tendon de mia loĝo,
eliris en la nebulon
kaj desegnis paŝe
la koordinatojn de la Vorta Sperto
sur la dezerton de argil' glacia
borde de l' rivero,
dismetante
la Erojn Subjektajn sur la ordinatoron,
sur la abscison
la Predikatajn.

Aŭdace avangarda, profunde persona, la poezio de Ragnarsson havas kroman trajton, unikan inter niaj grandaj poetoj: ligiteco kun la etoso — ĉi-kaze norda, soleca, naturproksima — de la poeta hejmlando...

Por la dua jarcento: realismo kaj socia ligiteco

En ĉi tiu jaro, kiam ni ĉiuj prave fieras pro la historia etapo, kiun nia lingvo atingis, iuj zorgoplenaj duboj tamen zumas ĉe nia orelo, kaj postulas vortumon kaj respondon. Oni eble juĝos bonvole jenajn mallongajn konsiderojn, kiuj naskiĝas el amo kaj respekto al la mirinda lingvo, kiun tiom da diversnaciaj homoj dum tiom da jardekoj sentis kiel sian propran.


Ĉu ni havos la finan venkon en la dua jarcento, jen demando de la movadano; ĉu ni **pretervivis** la duan jarcenton, jen simpla demando de tiuj, kiuj la Esperantan kulturon traesploras kaj komparas kun la internaciaj evolu-fadenoj, de tiuj, kies amo al Esperanto tamen ne stompis la senton pri normaleco kaj la kapablon pritaksi danĝerojn. Mi proponas, ke — por inde festi la Jubileon — ĉiu esperantisto aĉetu ekzempleron de *Esperanta Antologio*, kaj senhaste legu ĝin, dum la venontaj monatoj, de la unua paĝo ĝis la lasta: kritike tamen, kaj ne pasive-akumule, por ke tiu gravega dokumento de nia kultur-evoluo vere fariĝu parto de nia personeco kaj estigu tiun maltrankvilon, kiu sola devigas al reala kaj ne fikcia progreso. Oni komprenos tiam la dimensiojn de la spirita

En la mateno
kiam la tenda supro
jam blanke varmis
kaj la muĝa torento
transformis la Internacion
en personan
"Vi leviĝu!" —
mi sentis aromon, kaj elirante vidis
ke el la dismetita Sintakso
kreskis floroj
formante Krucon
pretan por Milito
min atendanta, dononta al mi Venkon
personan
dum la Vorto restos daŭre latent
ĝis la Centjariĝo
kaj plijariĝo plua
ĉar nia Lingvo mezuras sian venkon
ne per rekto,
fermo aŭ deklaro,
sed per Inspiro
persona
kaj fido al la Fantazio
allige al torento
eksterordinara

26 5 1987

maŝino, kiun la modesta juda okulisto tiom treme ekfunkciigis antaŭ jarcento; oni dekomence sekvas la ĉefvojon de nia kulturo, evidentiĝos la altoj de la Esperanta klasi-kismo, kaj ankaŭ la plataj malaltoj de la Esperanta provinco. El ĉi-lastaj naskiĝos la sento pri danĝero, la timo, ke Esperanto nerimarkite forglitas de la vivanta realeco al la rolo de kluba ludilo por sentimentaj burĝoj. Tion oni devas eviti, tion oni devas forigi de nia horizonto komence de la dua jarcento. Ĉia kluba etoso, kvankam varma kaj agrabla, estas neaerumita ĉambro, en kiu la movado riskas asfiksiiĝi.

Unue do: for la izolitecon. Ŝajnas, ke ni kreskis laŭ propra vojo, sendepende de naciaj influoj: kio kompreneble ne tute veras, kvankam oni provis dekroĉi nian evoluon de



Esperanta Antologio, "unu el la kvin kolonoj de nia kulturo" (Waringhien), fariĝas ĉi tie ia kontraŭ-aspirino, medikamento por pliintensigi konscion pri malsano. La medicina metaforo ŝajnas taŭga por Nervi, kuracisto, kiu cetere jam perlaboris sian rajton kritiki (Turoj de l' ĉefurbo, Esperantaj Kajeroj 1977).

la historio. Certe kulturo, kiu sin difinas internacia, kaj samtempe estas preskaŭ nealirebla far la naciaj kulturoj, estas nura paradokso. Do: ni bezonas ne nur tradukojn de la grandaj naciaj majstroverkoj, sed ankaŭ kaj ĉefe viglan diskuton pri ili en niaj revuoj, kritikojn, publikajn debatojn. — Ĉi-rilate, ankaŭ progreso en nia "interna" esarto estas al ni plej necesa. Mankas vasta kritikado pri la Esperanta literaturo, mankas detalaj analizoj pri ĝiaj aŭtoroj, pri ties mankoj kaj kvalitoj.

Due, kaj eble eĉ pli grave: for la psikologion, for la "intimajn sentojn, kiujn la povo protektas", laŭ la difino de Lukács. Ni memoru, ke grandaj verkoj ĉiam estas humuraj kaj politikaj samtempe, kaj do neniam koncernas la individuon, sed ĉiam la kolektivon; poezio neniam estas sentimentala konfeso aŭ iel privata afero; oni verkas ĝin, por ke aliaj homoj havu emocion estetikajn, vastsence politikan; poezio ne estas surstrata elsiteligo de personaj privataĵoj. Grandan, emoci-vekan, realisman literaturon ni plej bezonas por la estonteco, ĉar nur en la konkreta realo povas ekzisti grandeco kaj emocio.

Plenumo de tiuj du postuloj estas nepre antaŭkondiĉo, por ke la kreitaĵo de Zamenhof atingu la sojlon de la tria jarcento, por ke ĉiam pli da homoj profitu de ĝia neelĉerpebla trezoro.

Informi laŭ niaj ebloj

Mi esperas, ke oni ne prenos el ŝranko en Nieuwe Binnenweg 176 *Fundamento*, sonorilon kaj kandelon por min ekskomuniki, aŭ rite estingi mian stelon, pro mia konfeso, ke dum jardekoj mi disvastigis misinformojn pri Esperanto.

Mi esperas, ke mi disvastigis ankaŭ grandan kvanton da informoj ĝustaj. Sed mi ofte diris, eĉ foje skribis, ke, kontraste al nia jama stoko de poemoj, de tradukoj, noveloj, eĉ romanoj, stoko mirinde abunda kaj eĉ kvalite respektinda proporcie al nia mallonga historio kaj malgranda popolo, nia atingo en la drama fako restas mizera. Ke ĝi konsistas plejparte el la sceneje taŭgaj, home interesaj dramoj de eksaktoro Julio Baghy, unu perla unuaktaĵo de Auld, bela *Ginevra* de Privat, frutempaj forgesitaĵoj, pedagogiaj skeĉoj. Mi eĉ elpensis ekskuzojn pri tiu malriĉeco...

...ĝis akademiano R. Haupenthal invitis min prelegi pri niaj originalaj dramoj, kaj poste verki pri ili libron eldonotan de Iltis — ne lia sola ago por instigi seriozajn fakajn studojn. Tiam mi pli profunde esploris, en bibliotekoj kaj aliloke; kaj nun scias, ke ni jam havas pli ol tricent originalajn dramojn; multajn, kompreneble, bagatelajn aŭ eĉ fuŝajn, sed surprize multajn sufiĉe estimindajn, ekzemple tiujn de Flourens, Bulthuis, J. kaj K. Filip, "Bukar", "Dorno", Mattos kaj aliaj. Do, mi, kiu penas neniam mensogi, dum jaroj erare diris malveron. Mi povas nur esperi, ke kiam aperos mia libro, ĝi donos novan municion al tiuj, kiuj batalas kontraŭ tiu strange persista aserto el mistera malsciemo, ke "Esperanto ne havas literaturon."


Kvankam eble ne estas tute dece, ke pentofaranto prediku, mia konsterna sperto pri iom granda eraro sugestas al mi kelkajn pensojn pri informado, eble taŭgajn dum niaj centjarfestaj meditoj. Ĉar, kvankam estas kuraĝige, gratuli nin mem, kaj tre grave, labori en niaj grupoj, aŭ indi-

vidue solaj, por pligrandigi nian scion, estas ankaŭ grave, kaj pli kuraĝe, turni nin eksteren al la nekonvinkitoj kaj varbi ilin laŭeble.

Verkante hodiaŭ por la ne tre spertaj, mi emfazos tri punktojn pri informado: ni vere informu, ni ne trompu, do ni ne blufu pri Esperanto; ni plibonigu nian propran scion, por disvastigi scion; kaj ni sciu, kion ni ne scias.

La realaj praktikaj utilecoj kaj kulturaj atingoj estas jam tiaj, ke ni povas fiere preparoli ilin. Sed ni ne faru asertojn, kiujn oni poste malpruvos. Vero valoras: iluzioj kondukas nur al seniluziigoj. Do ni ne emfazu pri nombroj tre dubaj; ni ne pretendu, ke Esperanto jam tute malfermas la mondon, sed emfazu, ĝis kioma (reala) grado ĝi helpas tutmondajn kontaktojn. Ni neniam ridindigu nin, dirante, ke Esperanto portos pacon al la disŝirita mondo — kiam eĉ aktivaj esperantistoj foje disputas kun hontindaj malĝentilaĵoj kaj troigoj! — sed ni modeste insistu, ke Esperanto estas utila pozitiva kontribuaĵo al internacia interkompreno kaj senpera komunikado. Ni ne pretendu, ke oni povas plene regi Esperanton post du-semajna studado, sed ni klarigu, kial ĝi estas la plej facila lingvo. Se iu demandas, ĉu vere ĉiuj esperantistoj prononcas absolute same, ni konfesu, ke ne, aldonante, ke la etaj variaĵoj preskaŭ neniam miskomprenigas kaj ke ankaŭ nacilingve ekzistas tiaj variaĵoj, ofte pli gravaj. Niaj aŭtentikaj atingoj jam iĝis tre imponaj; tiujn verojn ni uzu.

Sed multaj el ni povus posedi pli abundajn verojn por tia uzado. Antaŭ nelonge, tre sincera kaj laborema esperantisto informis demandantan ĵurnaliston ke, ne, Esperanto ne estas lingvo por poezio. Li rajtis ne senti intereson pri poezio; sed, ho ve, ke li neniam legis kelkajn konsultlibrojn, por sciigi, ke nia poezio estas unu el niaj gloraj atingoj; ke li neniam rigardetis *Esperanta Antologio*. Ne necesas esti mem sciencisto, por scii pri la ekzisto de sciencaj verkoj, de Internacia Scienca Asocio Esperantista, ankaŭ societoj pri agrikulturo, komputado, matematiko, medicino, ornitologio: necesas nur kvin minutoj



Marjorie Boulton famas anglalingve pro prozo, Esperante precipe pro poezio. Ĉi tie tamen reliefigas ŝia unua forto: la kapablo verki klare, rekte kaj senpretende por siaj legantoj. Kaj ŝiaj rimarkigoj cetere saĝas. Kiom el niaj ekspozicioj k.s., male ol allogi, malvarbas homojn...?

kun la Jarlibro de UEA kaj dek minutoj kun ties librokatalogo aŭ alia. Se eble, eta informa ekspozicio montru ne nur afiŝojn, sed kelkajn librojn de kiel eble plej diversaj specoj, kelkajn diversajn gazetojn. Kiam scivolantoj vizitas mian hejmon, mia Esperanta libraro, kolektita dum 37 jaroj, estas mia plej valora propagandilo.

Esperantistoj nepre aĉetu Esperantajn librojn! kaj abonu kelkajn gazetojn. (Mi trovis, ke *Monato* aparte bone konvinkas kaj impresas, ĉar rigardantoj rapide konstatas, ke oni verkis pri aferoj ĝenerale interesaj en la ordinara mondo, do Esperanto facile esprimas la necesajn konceptojn.) Ni posedu, minimume, kelkajn konsultlibrojn.

Ne ĉiuj, kiuj volas iom servi Esperanton, povas, tamen, posedi taŭgan libraron: ili vere ne havas monon por Esperantaj libroj kaj gazetoj (nu, ĉu vi tamen fumas? ŝminkas vin? aĉetas gazetojn nur frivolajn?... Sed estas ankaŭ tiuj, kiuj apenaŭ povas aĉeti sian panon aŭ ŝuojn). Aŭ registaraj malklerigiloj malhelpas. Se ni deziras bonan propagandon ĉie, tiuj el ni, kiuj disponas pri rimedoj, nepre iom helpu tiujn, kiuj bone intencas sed tre malriĉas: laŭeble starigu etajn bibliotekojn por lokaj grupoj, petu helpon de oficialaj bibliotekoj, sendu librodonacojn kaj adoptu per gazet-abonoj, transdonu legitajn gazetojn; en pluraj medioj, eĉ malbela brokanta lernolibro estas trezoro rara. Mi pensas precipe, nunmomente, pri niaj nun surprize multaj bravaj pioniroj en Afriko — sed malriĉuloj troviĝas ĉie.

Se ni prikantas nin "pacaj batalantoj", ni memoru, ke soldato, kiu forgesis sian municion, ne batalos tre sukcese: ni ekipu nin mem kaj helpu aliajn ekipiĝi.

Dum ni esperantistoj foje blufas per troigoj, unu el niaj propraj eraroj estas, subtaksi niajn realajn jamajn atingojn. Ni ofte tre subtaksas nian vortostokon kaj esprimrimedojn, ĉar ni ne sufiĉe observis kaj esploris ilin; ne komprenas, kiel vasta, rilate al nur cent jaroj kaj apartaj malhelpoj, estas nia literaturo; ne konstatas, kiel eksterordinara estas la Delegita Reto, aŭ la alia granda reto, neoficiala, sen statistiko, de privataj plumamikecoj kaj



praktikaj interŝanĝoj tra la mondo; ne rimarkas, kiom da internaciaj peresperantaj aranĝoj okazas ĉiujare krom la Universala Kongreso; ne scias, pri ekstreme testaj verkoj, kiujn oni jam brile tradukis en Esperanton, aŭ ke multaj fakterminoj jam aperis; ne scias pri niaj radioprogramoj, sonbendoj, grupoj de aktoroj, ĥoroj, turismaj aranĝoj...

Ni malofte sukcesas varbi seriozulojn, nur per anekdotoj pri nobla knabo en Bjalistoko, flago, du afiŝoj kaj kelkaj leteroj kun interesaj poŝtmarkoj. Kaj per tro mizeraj informoj aŭ impresoj pri naiveco, ni tro facile malvarbas.

Kvankam estas tre dezirinde, ke ni ĉiuj kiel eble plej plene komprenu nian grandiozan progreson de la jarcento, tamen multaj vere ne havas tempon aŭ monon, foje, eĉ, kun bonegaj intencoj, ne kapablon, por profundaj studoj. Sed eĉ por tiuj, kiuj havas tempon, monon kaj kapablon, estas limoj.

Esperanto jam atingis tian vortostokon kaj kulturon, ke, same kiel pri iu ajn fako studinda, neniu, eĉ ne profesia fakulo, povas scii ĉion scieblan pri ĝi. Foje, indiki tion takte, responde al demando, povas utile imponi. Inteligenta humileco estas ĉi tie, kiel ĉie en la vivo, grava ingredienco en vera saĝo.

Se iu skeptike, eble mokete, demandas, "Ĉu vi povas traduki en Esperanton...?" — iun malfacilan frazon, teknikan, tropan, slangan ktp, oni ne respondu, "Hu-u-u, ne!" sed, preferinde, "**Mi** ne povas; pri tiaj aferoj mi ne estas lerta; sed pli lerta esperantisto povus..." kaj menciu kelkajn malfacilajn verkojn jam tradukitajn; citu ian nomon taŭgan sur la loko — Auld, Daŝgupto, Knoedt, Miyamoto? — "**Li** povus elpensi ian bonan ekvivalenton!"

"Ĉu ekzistas esperantistoj en Kongo?" Tiu, kiu ne scias — mi mem korespondas kun konga esperantisto — povas respondi, "**Mi** ne scias; sed se estas tie, kie vi deziras kontaktojn, mi enketos por vi." (Do, ekzistas metodo por enketi pri io tia.) "Vi ne povas diskuti pri muziko Esperante, ĉu?" — "**Mi** ne kapablas diskuti pri muziko en iu ajn lingvo, sed la anoj de la Muzika Esperanto-Ligo certe povas." Ofte, ni povas ligi honestan konfeson pri nescio al ia tia indiko pozitiva. Ni sugestu, ke preter la ĝardeneto, kiun ni laŭ propra gusto kaj kapablo kultivas, etendiĝas vasta fruktodona tereno, kiun ni ne esploris.

Al la tede ofta demando, "Kial Esperanto ne sukcesis?" ni **minescias-u**, sed poste ni firme **miscias-u**; ĉar unue oni povas repafi la sagon per, "Mi ja ne scias, kial la homaro ankoraŭ ne akceptis ion tiel memevidente utilan, justan kaj belan..." poste sugestis ke "eble kelkaj faktoroj estas..." menciante ekzemple intencajn misinformojn, persekutojn, kolektivitan egoismon kaj arogantecon de la lingvaj imperioj, niajn malgrandajn monrimedojn dependantajn plejparte de sinoferoj de individuoj... sed ni nepre aldonu, "Sed Esperanto **ne** malsukcesis; ĝi jam brile sukcesis, sed malgrandskale, kompare kun la eblecoj..." Ĉar fakte, en niaj cent jaroj, meze de ĉiuj niaj malhelpoj kaj misfortunoj, nia progreso, nia literaturo, niaj praktikaj utiloj kaj nia supernacia popolo estas en la kategorio pli de mirakloj, ol de fiaskoj.


Jen kelkaj ideoj por la ne tre spertaj varbemuloj. Sed estas kun iom ruĝaj vangoj, kaj iom oblikva rigardo, ke mi fine ripetas, ke ankaŭ nia originala dramo prezentas jam tre interesajn atingojn...

La estontaj pensmaŝinoj,


Lingvo-Teknologio

La epoko de la lingvokomputiloj ĵus komenciĝis. Dise en la mondo, industria kaj universitataj projektoj celas al multe plibonigita tekstoprilaborado, duon-aŭtomata korektado laŭ ortografiaj, gramatikaj kaj stilaj reguloj, al parol-rekono, nacilingva konsultado de datum-bazoj kaj ekspertaj sistemoj, tuja ĝisdatigo de fakvortaroj ktp.

Samtempe, la evoluigo de potencaj, novgeneraciaj traduksistemoj ekhavas strategian gravecon. Meze de la internacia konkurenco, BSO estas plifortiganta sian pozicion kiel konstruisto de DLT (Distribuita Lingvotradukado), multlingva reto inter personaj komputiloj.



Tia estonta reto kun enkonstruita tradukfunkcio servos al la nova internacia ordo de informado, al la evoluantaj kaj lingve izolitaj landoj, same kiel al internacia komunikado en entreprenoj kaj institucioj.




Dum la lastaj kvin jaroj, la esplor-investoj por DLT daŭre kreskis. Ĉi-jare ilia sumo superos 6 milionojn da guldenoj. Pliaj 11 milionoj estas antaŭviditaj por la trijara periodo 1988-1990. La enmerkato de DLT komenciĝos en 1993.

Ĝis tiam, severa konkuro estos ankoraŭ trapasenda. El niaj diversaj konkurantoj, kelkaj apartenas al la plej grandaj entreprenoj de la mondo. Aliaj havas egan buĝeton el ŝtataj aŭ internaciaj monrimedoj, aŭ la apogon de prestiĝaj universitatoj. Ankaŭ BSO daŭre klopodas pri internaciaj ligoj kaj industriaj partnerecoj utilaj al DLT.

Kune kun la bolivia sistemo "Atamiri", DLT estas la sola projekto kiu havas plenan interlingvon kaj krome ne estas limigita al hindeŭropaj lingvoj.

Esperanto estas la speciala atuto de DLT en la tradukmaŝina konkuro.




Ĉu denaske esperantlingvaj?

Artefarita Inteligento


Komputiloj kiuj povas kompreni homan lingvon — jen unu el la plej grandaj teknologiaj defioj hodiaŭ. Certagrade tiu kompreno estas necesa en la tradukprocezo de unu lingvo al alia, aŭ inter homa lingvo kaj iu formala sistemo.

Pro tio, permaŝina tradukado kaj naturlingva aliro al komputiloj aŭ informobankoj ne nur kontentigos kreskantajn praktikajn bezonojn, sed ĝi ankaŭ implicas gravan progreson en la teoriigado kaj modeligado de la homa pensado.



Semantikaj retoj estas bazostrukturoj ĝenerale akceptitaj en la faktereno de Artefarita Inteligento. Ilin uzas, laŭ diversaj variaĵoj, esploristoj en Usono, Eŭropo kaj Japanio. Kiaj ajn estas la precizaj teknikaĵoj de tiuj retoj, la konceptoj kiujn ili enhavas estas prezenteblaj nur per vortoj de homa lingvo.


Principe ĉiu homa lingvo povus servi por tio, sed praktike Esperanto estas la plej taŭga, pro sia altgrada reguleco kaj senhomonimeco.



Do, la traduksistemo DLT apogas sin sur sciobanko kiu mem estas verkita tute laŭ Esperantaj leksiko kaj semantiko. Per ampleksa mondscio, tiu banko helpas malambiguigi kaj pliriĉigi la interlingvan (IL-an) duonprodukton de la tradukprocezo.

La unuajn sukcesojn tiurilate BSO jam atingis en ĉi-jaraj eksperimentoj. La finfina sukceso tamen estos la ĝenerala mondscio sur kompakta DLT-disko, ĉie havebla kaj konektebla al oficejaj kaj hejmaj komputiloj. Per ĝi tradukiĝos eĉ la subtitoloj de persatelita televido.

Tia novgeneracia tekniko eblas nur ĉe konstanta provizado per novgeneracia talento — certe ankaŭ pri Esperanto. Pro tio ni deziras al tiu ĉi lingvo prosperan duan jarcenton, kaj impetan 11-an jardekon.



BSO/Research
Poŝtkesto 8348
NL-3503 RH Utrecht, Nederlando
Telefono (...31-/0)30-911911
Telekso 40342
Reta Adreso: gen@dlt1.uucp

La diplomatoj kaj Esperanto: vojoj al monda komunumo

Ambasadoroj ofte rolis kiel komprenantoj kaj advokatoj de novaj ideoj. En marto 1610, la brita ambasadoro ĉe la Doĝo en Venecio, la tagon kiam aperis la libro de Galilejo — *Sidereus Nuncius (La stela kuriero)* — raportis al Londono pri la eltrovo kaj promesis sendi ekzempleron de la nova teleskopo per la venonta ŝipo. En aprilo 1790, la franca diplomato Talleyrand subtenis la proponon de Gabriel Mouton pri la metra sistemo, kaj persvadis la Nacian Asembleon peti raporton de la Akademio de Sciencoj. En 1799 la franca revolucia registaro aprobis la sistemon "por ĉiuj popoloj, por ĉiam". Dum la dua mondmilito juna aŭstralia diplomato sendis al sia lando la unuan manplendon de la mirakla hibrida maizo, kiu rezultigis grandegan ekspansion de la maiza rikolto.

Tamen estas dubinde ĉu la germana ambasadoro en Sankta Peterburgo en 1887 raportis, ke aperis en Varsovio mirinda nova lingvo, kiu tre taŭgos por la diplomatio. Same kiel la latina estis la komuna lingvo de sciencistoj en la 17a jarcento, la franca servis kiel la diplomacia lingvo en la 18a kaj 19a. Ĉiu diplomato lernis la francan kaj per tio povis rilati kun la monarko, la kortego, la registaro kaj la socio. Traktatoj estis redaktitaj en la franca, kaj ambasadoroj eĉ verkis siajn raportojn en tiu preciza faka lingvo. Jam en la 19-a jarcento la usonanoj kaj aliaj angloparolantoj komencis insisti, ke ilia lingvo estu rekonata kiel egala por diplomacia uzado, ekzemple en traktatoj. Tamen ĝis la unua mondmilito restis vere, ke, almenaŭ en Eŭropo, diplomato ne sentus bezonon de nova internacia komunikilo.




Ĉepodie en Reĵaviko: eksambasadoro de Aŭstralio ĉe UN, Ralph Harry grandskale helpis pliprestigi Esperanton.

Nek *Enciklopedio de Esperanto*, nek *Esperanto en Perspektivo* havas rubrikon pri diplomatoj, kaj ne estis multaj diplomatoj inter la fruaj adeptoj. (Tamen la unua ambasadoro de Finnlando en Japanio estis konata filologo kaj esperantisto, profesoro Ramste.) La raporto pri la unua UK en 1905 ne priparolas la eblecojn de Esperanto por la diplomatio. Ne partoprenis invititoj el la ambasadoj en Parizo, nur la urbestro de Bulonjo-sur-Marzo kaj la prezidanto de l' Bulonja komerca ĉambro.

Sed, oni diros, Zamenhof faris en 1915 alvokon al la diplomatoj. Estas vere. En sia traktaĵo *Post la granda milito* Zamenhof turnis sin al la diplomatoj, kiuj kunvenos kaj penos reordigi la rilatojn inter la popoloj. Kion li diris? Li parolis ne pri la bezono de internacia lingvo. Li tute ne menciis Esperanton! Li urĝis, ke ĉiu civitano en ĉiu regno havu plenan rajton paroli tiun lingvon aŭ dialekton, kiun li volas, kaj konfesi tiun religion, kiun li volas... ke ĉiu regno kaj ĉiu provinco portu ne la nomon de ia gento sed nur nomon neŭtrale-geografian. Plej bone estus, li diris, se oni havus jam geografie aranĝitan "Unuigitajn Ŝtatojn de Eŭropo". "Se nun estas ankoraŭ tro frue," li aldonis, "almenaŭ oni devas forigi la identigon de lando kun gento... tiam neniam kaj nenie oni povos diri, ke 'la patrujo estas en danĝero'." Zamenhof ankaŭ proponis la starigon de Konstanta Tut-Eŭropa Tribunalo. Sed lia tezo estis, ke "la malamo inter la gentoj ne malaperos subite en unu tago, kian ajn aranĝon la diplomatoj faros." Li sciis, ke estas aliaj kaŭzoj de la malamo krom la "facile forigebla reciproka nekomprendado kaj nekonado". Por forigi tiun malamon poste laboros personoj privataj; de la diplomatoj oni atendis nur, ke ili donu la eblon tion fari. "Sinjoroj diplomatoj," li diris, fine, "Eŭropo atendas de vi pacon... ne kelktempan interpaciĝon, sed pacon konstantan."

Bedaŭrinde la diplomatoj en la Packonferenco de Versajlo, se ili aŭdis pri la alvoko de Zamenhof, ne sekvis lian konsilon pri la neindentigo de regno kaj gento, kvankam la traktatoj pri minoritatoj iomete respegulis lian principon pri la lingvorajtoj. Sed ili ja starigis la Ligon de Nacioj, la Internacian Labor-Organizaĵon, La Universalan Telegrafian Union kaj la Universalan Poŝtan Union. Tiel komenciĝis nova erao por la diplomatio.

La Ligo estis nova fenomeno. En Ĝenevo, en la Palaco Wilson, sidis la diplomatoj, iuj profesuloj, aliaj eminentuloj (Aŭstralio kaj Kanado ne havis karierajn diplomatojn). En la Ligo la angla, kun la franca, estis oficiala lingvo, sed tio ne multe ĝenis la delegitojn. En Ĝenevo oni parolis france, kaj eĉ la britoj lernis iom de tiu lingvo. Tamen UEA, al kiu donis tiom la junaj svisoj Edmond Privat kaj Hans Jakob, laboregis por persvadi la Ligon kaj la fakajn organizaĵojn oficialigi kaj uzi Esperanton. ILO eldonis bultenon en Esperanto pri sia agado, kaj tiel Esperantujo lernis pri la klopodoj protekti infanojn kaj virinojn en la laborejoj. La Telegrafa Unio finfine akceptis Esperanton kiel klaran lingvon, sur la sama bazo kiel la latinan. En la Poŝta Unio oni organizis klasojn por oficistoj, kaj kiam landoj eldonis poŝtmarkojn Esperantajn,



"Solvo de la lingva problemo": jam preskaŭ 70 jarojn UEA batalis por pli justa kaj racia komunika ordo ĉe la interŝtataj organizaĵoj. Dekstre: Ivo Lapenna, kune kun Marianne Vermaas (tiame resp. Prezidanto de UEA kaj Direktoro de la Centra Oficejo) prezentas la Proponon de 1966, subskribitan de 920 954 individuoj kaj 3843 organizaĵoj, al la vic-sekretario de UN. Apude, la sidejo de Unesko kaj UN-kunsido: ankoraŭ surdaj.



ili estis akceptitaj sen protesto. Estas eble signife, ke en la fakaj organizaĵoj la delegitoj estis kutime "provizoraj" diplomatoj — ekzemple en ILO la dungistoj kaj la laboristoj sendis siajn proprajn reprezentantojn, praktikajn homojn.

En la Asembleo kaj Konsilio de la Ligo estis alia afero. Kaj la delegitoj kaj la internaciaj oficistoj en la Sekretariato estis kutime profesiaj diplomatoj aŭ eksdiplomatoj. Ankaŭ tie oni debatis publike kaj la resolucioj estis politikaj, ne fakaj. Tial, kiel veras nun en UN, la diplomatoj devis strikte instrukciojn senditajn el la nacia ĉefurbo. Ne sufiĉis persvadi diplomatojn pri la valoro de Esperanto. Oni antaŭ ĉio devis konvinki la ministrojn kaj la oficistojn de la ministrejo.

La historio de la klopodoj en la Ligo, la sukceso de nia movado ĉe eminentuloj kiaj Lord Robert Cecil (reprezentanto de Sud-Afriko), Lafontaine (Belgio) kaj Wellington Koo (Ĉinio), la konferenco de instruistoj en la Instituto J.J. Rousseau, la raporto de la Ĝenerala Sekretariato *Esperanto kiel internacia help-lingvo*, akceptita de la tria Asembleo en 1922, kaj la kontraŭagado de iuj belgaj, francaj kaj aliaj delegitoj estas bone konataj dank' al la *Historio de la lingvo Esperanto* de Edmond Privat. Kelkaj diplomatoj kaj oficistoj de la Ligo fariĝis almenaŭ simpatiantoj se ne esperantistoj. Kaj Esperanta traduko de la *Kontrakto de la Ligo de Nacioj* de Daniel Eyquem, E. Grosjean-Maupin kaj W.M. Page kune kun la bultenoj de ILO provizis pruvon, ke Esperanto kapablas esprimi precize la nuancojn de la diplomatia lingvo.

Tamen mi ne trovis raportojn pri diplomatoj, kiuj lernis Esperanton en la periodo inter 1920 kaj 1939. Kiel studento en la Universitato de Tasmanio, en 1935, mi aspiris eniri la novan aŭstralian diplomatian servon, kaj lernis Esperanton. Kun Pastro C.C. Cowling mi studadis per

Esperanto la kulturon de aliaj landoj, inkluzive la evoluon politikan kaj ideologian en Germanio kaj Italio. Ni tradukis el Esperantaj gazetoj artikolojn por nia universitata revuo. Sed mi ne memoras pri mencio de iu ajn "verda" ambasadoro.

Kiel sciante, esperantistoj daŭrigis sian laboradon dum la plej nigraj tagoj de diktatoreco, kaj dum la dua mondmilito. Sed la diplomatoj ne multe atentis. Kiam oni ekzamenis min kiel kandidaton por la aŭstralia Departemento pri Eksterlandaj Aferoj en 1940, la komitaton interesis pli la fakto ke mi scipovas la francan kaj nederlandan ol la fakto, ke mi iam lernis la internacian lingvon.

La *Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj* (1945) ne mencias Esperanton. Sed ĝi enhavas du elementojn, kiuj reliefigas la neceson de neŭtrala helplingvo. Unue, ĝi substrekas la rajtojn de koloniaj popoloj al sendependeco, kio siatempe antaŭindikis, ke la nombro de sendependaj, egalaj ŝtatoj multiĝos. Kaj due, Artikolo 111 entenas, ke la ĉina, franca, rusa, angla kaj hispana tekstoj de la Ĉarto estas egale aŭtentikaj. Pro tio ekestis kvin oficialaj lingvoj kaj post kelkaj jaroj oni aldonis la araban, kaj donis iun statuson ankaŭ al la germana (kvankam al kiu germana ne estis decidite!). Alia nova faktoro estis, ke UN havas organizitajn rilatojn kun la "Specialigitaj Institucioj", inter ili Unesko.

Ĉi lasta faktoro gravis, kiam la Esperanto-Movado prezentis sian gigantan peticion (kiun subskribis multaj politikistoj sed malmultaj ambasadoroj) al la Ĝenerala Sekretario de UN: ĉar li povis sendi ĝin, sen iu ajn diskutado en UN mem, rekte al Unesko kiel la taŭga faka organizaĵo. Tiel, difference de la sperto en la Ligo de Nacioj, la diplomatoj en Novjorko — kun la escepto de tiuj, kiujn informis la landaj asocioj de la Esperanto-movado — eksciis preskaŭ nenion pri la demando pri internacia lingvo. Por

ili la problemo ne estis grava, ĉar plejparte ili lernis unu el la oficialaj lingvoj — ofte la anglan, de kiu oni parolas specon en Novjorko! Kaj la nova sistemo de samtempa interpretado funkciis dank' al nova teknologio — almenaŭ en la ĉefaj salonoj.

Nek la sekretariato de interŝtata organizaĵo, nek la diplomatoj, kiuj estas konstantaj reprezentantoj ĉe la organizaĵo, iniciatos rezolucion pri Esperanto, ĉar ne estas bona grupo de registaroj pretaj por instrukcii siajn ambasadorojn. Oni devas vendi tian ideon en la ĉefurboj, eĉ se oni samtempe influas la diplomatojn kaj penas konvinki ilin, por ke ili tiel konsilu siajn registarojn.

La sukcesoj de Esperanto en Unesko estas bone konataj. Komence oni persvadis la Organizaĵon fari enketon ĉe la registaroj, kaj mi kun aliaj esperantistoj "helpis" mian registaron verki la respondon. Tiuj raportoj estis bazo, sur kiu Ivo Lapenna kaj aliaj venkis super ĉiu kontraŭa agado en 1954 en Montevideo. Oni devis laboregi en


pri la buĝeto, sen interpretistoj, en la Komitato! Mi parolis kun la Ĝenerala Direktoro de Unesko, d-ro M' Bow, en Reĵaviko (1977) antaŭ la inaŭguro. Mi sidis apud li dum la posta lunĉo. Mirigite li diris: "Ĉi tiu estas la unua internacia kongreso kie mi spertis, ke la lingvo unuigas, ne dividas la homojn. Ekde nun UEA havas amikon en Parizo."

Nun ni atingis la gravan duan rezolucion de Unesko en Sofio, rekomdantan al la registaroj, ke ili celebru ĉi tiun Centjaran Jubileon. Tio helpis nin kapti la interenson de aŭstraliaj instancoj. Sed ni devas daŭrigi niajn klopodojn konvinki la diplomatojn, ke internaciaj organizaĵoj devus uzi la lingvon, kaj ke ili, la diplomatoj, ankaŭ profitus el lernado.

Ni devas gratuli la entuziasmojn kaj spertulojn en Eŭropo, kiuj persvadis la nederlandan registaron financi la provadon de Esperanto kiel ponto-lingvo en komputila tradukado. Estus grava venko, se la Komunumo fine akceptus tiun sistemon. La registaroj ŝparus multe da mono, kaj estus bona reklamo por Esperanto. Verŝajne tio devas havi prioritaton en la nuna tempo, sur la kampo de agado por provizi Esperanton al la diplomatio kaj al internaciaj organizaĵoj. Tamen, kiel diplomato kiu jam celebris sian 50an datrevenon kiel esperantisto, kiu estis diplomato dum 38 jaroj, mi havas pli vastan vizion — de diplomatoj, kiuj uzos la internacian lingvon ĉie en la mondo, kaj de epoko kiam Esperanto estos uzata de diplomatoj kaj oficistoj en la vere internacia komunumo, kiu nepre devos realiĝi, por certigi ke la mondo pluvivu.

Antaŭ kelkaj jaroj mi sugestis, en E-*Ekspreso* de la Pola Radio, ke oni povus starigi asocion de Esperanto-parolantaj diplomatoj. Mi mem renkontis rusan ambasadoron en Rio-de-Ĵanejro, germanan ambasadoron kiu deĵoris en Libano, hungaran ambasadoron (en UK!), danan konsilanton en Novjorko (Eskil Svane, kiu kuntradukis la Ĉarton de UN), jugoslavan diplomaton en Kanbero kaj oficistojn en UN, Unesko kaj la Monda San-Organizaĵo. Mi aŭdis pri vjetnamia ambasadoro en Moskvo kaj aliaj kvazaŭdiplomatoj. Kelkaj junaj aŭstraliaj diplomatoj lernis Esperanton en Kanbero.

Mi certas, ke ĉiuj havis la saman sperton, kiel mi — ke ne necesas atendi akcepton de UN, por ke Esperanto estu utila al diplomato. Per la antologioj kaj aliaj libroj kaj gazetoj oni povas prepari sin por loĝado en nova lando. Kiam oni alvenas oni trovas tuj amikojn, kiuj helpas klarigi la kutimojn kaj vidpunkton de la popolo. Inter la esperantistoj estas ofte spertuloj, kiuj povas informi. Kaj, kiel mi trovis en dekoj da lokoj en Svislando, Belgio, Vjetnamio kaj Germanio, ambasadoro ricevas invitojn paroli pri sia lando, kune kun loka interpretisto — invitojn kiujn aliaj ambasadoroj ne ricevas, eĉ se ili flue parolas la landan lingvon. Ĉar ambasadoro, kiu parolas Esperanton, ne estas nura reprezentanto de ŝtato por antaŭenigi ĝiajn interesojn, sed interpretisto inter la popoloj kaj pioniro de la evoluanta tutmonda komunumo.



La batalo daŭras: UEA ĉe Unesko-konferenco en 1979. Spite agnoskon en la ĝenerallaj kunsidoj, venkoj ĉe la konstanta uneska oficistaro montriĝas malfacilaj...

la ĉefurboj, en Parizo kaj en la Ĝenerala Konferenco mem (per la ekzpozicio kaj persona persvadado), por certigi, ke la delegitoj voĉdonos por la rezolucio. Estis por ni triumfo, sed por la diplomatoj estis nur unu rezolucio inter multegaj.

Tio, kion oni devas substreki ĉe la diplomatoj rilate Uneskon, estas ĝuste la uzo de Esperanto por afiŝoj pri homaj rajtoj, titoloj de fotoj en ekspozicioj, broŝuro de Unesko en Esperanto, dokumento pri internacia edukado, kaj super ĉio la 20 volumoj de la Serio Oriento-Okcidento. Tio estas videbla atestaĵo, ke Esperanto estas ne nur logika kaj facile lernebla sed ankaŭ lingvo taŭga por iliaj Ambasadoraj Moŝtoj!

Treege gravaj ankaŭ estas la vizitoj de diplomatoj al Universalaj Kongresoj. Estas plaĉe, kiam ili lernas iom da Esperanto por saluti la kongreson. Sed eĉ se ili nur diras afablaĵojn nacilingve, ili tamen vidas, ke Esperanto funkcias. Estus utile listigi kaj analizi ĉiujn diplomatojn kiuj vizitis kongreson en la pasintaj 30 jaroj. En Antverpeno ni havis viziton de funkciuloj el la Eŭropa Komisiono en Bruselo. Ili ne ekscitiĝis pri la inaŭguro aŭ la literaturaj konkursoj, sed ili miregis pri la vigla internacia diskutado

Anna Brennan (Italio):

La plej intima ligo

Per la romia imperia poŝta servo, starigita en la tempo de la imperiestro Aŭgusto, oficiala dokumento povis vojaĝi de Marsejlo al Romo en iom pli ol unu semajno. Bedaŭrinde tiu servo falis kun la Imperio. Mi ofte ricevis la impreson, ke preskaŭ du mil jarojn poste, oni ankoraŭ ne sukcesis reatingi la saman nivelon de efikeco. Je la 9a de majo, mi ricevis leteron afrankitan en Roterdamo je la 13a de aprilo. Tio signifas, ke ĝi bezonis preskaŭ kvar semajnojn por vojaĝi inter Roterdamo kaj Romo.

Tiu okazaĵo igis min mediti pri la intima rilato, kiu ligas la esperantistojn kun la poŝtaj servoj. Bone funkcianta poŝta servo estas esenca antaŭkondiĉo por efika agado en la Esperanto-movado.

Ni esperantistoj estas fakuloj pri ĉiu aspekto de la poŝto. Ni konas ĉiujn tarifojn kaj flankajn servojn. Ĉu vi neniam kulpis pri longa vico en la poŝtoŝtelo, ĉar vi devis sendi unu leteron aere al Usono (15 gm.), unu presaĵon al Brazilo (25 gm.), alian al Svedujo (85 gm.), alian presaĵon same al Svedujo sed aere (20 gm.), unu poŝtkarton al Japanujo kaj malgrandan pakaĵon registrite al Estonujo (75 gm.)? Cetere vi volis ankaŭ aĉeti dek aerogramojn, kvin afrankitajn poŝtkartojn kaj pagi la tuton per internaciaj respondkuponoj.



Internaciaj respondkuponoj estas alia interesa temo. Laŭdire, la vera Esperanta valuto estas la stelo, sed ĉiuj scias, ke praktike ĝi estas la internacia respondkupon. Verŝajne Esperantaj vortaroj estas la nuraj en la mondo kiuj kutime eĉ aperigas la mallongigon (rpk aŭ irk). Mi dubas, ĉu ie ajn ekster nia movado ekzistas homo, kiu iam uzis respondkuponojn aŭ scias, ke ili ekzistas.

Internaciaj respondkuponoj povas cirkuli dum jaroj en nia movado sen iam ajn esti enkasigitaj. Ni tute ne surpriziĝas, se korea korespondanto sendas al ni tri respondkuponojn, el kiuj unu estas stampita en Seattle (Usono), unu en Riŝon-Lecion (Israelo) kaj unu en Fontenay-sous-Bois (Francujo). Bonŝance, respondkuponoj havas senliman validecon, ĉar mi mem vidis ekzemplerojn datitajn dek jarojn antaŭe. Ili aŭtomate rezistas la inflacion, ĉar ili ĉiam valoras same kiel unu eksterlanda letero.

Estas rimarkinde, ke en internacia movado kiel la nia, la telefono neniam akiris la saman gravecon kiel la poŝto. Sed idealistoj kutime ne estas riĉaj homoj, kaj internaciaj

telefonvokoj estas multekostaj. Tamen mi supozas, ke almenaŭ en la eŭropa movado, ni ja faras pli da internaciaj vokoj ol la meznombro en la ĝenerala socio.

Se la Esperanto-movado dependas de la poŝtaj servoj, ankaŭ la malo validas: la ekesto de bonaj internaciaj poŝtaj ligoj necesigis internacian lingvon.* Ne estas hazardo, ke la bezono je internacia lingvo sentiĝis aparte forte dum la 19a jarcento. Dum tiu jarcento okazis eksterordinaraj saltoj en la kampo de internaciaj komunik- kaj vojaĝ-eblecoj. Ekestis la unuaj fervojoj, la unuaj telegrafaj kompanioj, kaj pli malfrue, la unuaj aŭtomobiloj (la unua komerce sukcesa modelo aperis en 1885, du jarojn antaŭ la unua libro de Esperanto).

Ĝis la mezo de la 19a jarcento, se necesis sendi mesaĝon de unu loko al alia, la sola ebleco estis fizike porti (aŭ portigi) ĝin. La plej rapida maniero fari tion estis per ĉevalo. Post la invento de la telegrafo, tamen, urĝaj mesaĝoj povis fulmi de unu urbo al alia. Leteroj, kiuj antaŭe vojaĝis en poŝtaj kaleŝoj aŭ velŝipoj, estis nun portataj per trajno aŭ vaporŝipo.

Estas malfacile nun imagi, kion tiuj evoluoj signifis en sia epoko. Oni devas kompari ilin kun la nuna komunika revolucio pro la ekuzo de komputiloj. Verŝajne, kiel nun, la ŝanĝiĝoj ne okazis en unu tago, aŭ eĉ en unu jaro, sed komenciĝis malrapide, tiam iom post iom akceliĝis, ĝis ili atingis nehaltigeblan elanon.

La pli facilaj vojaĝeblecoj utilis ne nur al leteroj kaj pakaĵoj. Kun la kreskantaj fervojaj retoj disvastiĝis ankaŭ la

La artikoloj de Anna Brennan — i.a. kontribuinto kaj redaktinto de Kontakto kaj Sekso kaj egaleco — ofte notindas pro simpla rekta parolo pri la ĉiutaga vivo. Tiu trajto cetere pli vaste imitindas en nia gazetaro!

turismo. Kaj en tiuj kondiĉoj, la bezono je internacia lingvo evidente sentiĝis. Finfine, kiel utilas la ebleco sendi mesaĝon inter Madrido kaj Frankfurto en kelkaj horoj, se neniuj komprenas ĝin kiam ĝi alvenas? Kiel ordinaraĵoj povas profiti de pli facila vojaĝado, se ili ne parolas la lokajn lingvojn?

Kontraŭ tiu fono oni povas kompreni, ke kiam aperis la unuaj libroj de Volapuko en 1880 kaj de Esperanto en 1887, jam ekzistis vasta publiko, kiu estis preta entuziasme akcepti la ideon de internacia lingvo. Temis pri projektoj, kiuj trafis la ĝustan momenton.

Sed ne necesas daŭrigi la rakonton. Vi ja scias, kio okazis poste. Kaj cetere, mi devas haste porti ĉi tiun artikolon al la poŝto. Restas nur kvar semajnoj ĝis la limdato, kaj mi jam dubas, ĉu ĝi sukcesos alveni ĝustatempe.

*Anglalingvanoj legu tiurilate p.87-89 de *The Artificial Language Movement* de Andrew Large: Oksfordo, Blackwell, 1985 (nun havebla broŝurita de UEA, 42,00 gld.).

Zamenhof, mi nun danke vidas vin
anhelintan, post la penado,
ĝis via propra domoazo.

Estis tiu tago Julia.
Ne plu marŝis la kruroj, preskaŭ kure,
ĉe la stratflankoj
sub la somervestitaj arboj
de Varsovio.
Tirfermite, la pordo
bruojn kutimajn ektranĉis for.

Kelkaj momentoj diamantigitaj
ekster karbonan ordinaron
de la tempa fulgiĝo.
Provizore ne plu konsternis
la jarcento da tagonoktoj
kiu post tio — ĉiam pli sange, brule —
manĝis tra ĉiuj paĝoj sur la kalendaro
ĝis nun, ĝis ni.

Hejme, desapontita
eble ĉar Klara
tamen ne povis plu atendi:
ŝi al kiu la koro
flugis antaŭen
preter la polva trotuaro,
super la domojn
ĉiam atendantajn, ke iu giganto
malfermu unuope la tegmentojn
kaj per fingro tenera
ĉion ordigu al sano.

En la presejo tiu ulo
lante, hodiaŭ tro lente,
reteneme pedantis,
ĝis la lastaj monerogutoj
en manĉon plaŭdetis avidan;
kaj li krome insistas ŝovi siajn klaĉojn
trans la sinagogan sojlon de via koro
ĝis la silentejo, loko plej sankta.
Li babilis... pri kio?
lu cara gravaĵo sensignifa
kaj infano viriniĝanta
de la korteto apude,
kies voĉo elverŝis la kanzonon
por saluti someron,
en ĉi jaro ankaŭ por ŝi tre specialan,
kisdolĉan je promesoj.

Hejme. Kortremo kuris en la manojn.
Unu dikfingro paĝojn disflirtigis
kvardek. Libro, kiel la homo,

tre modesta — vidaĵe preskaŭ subnivela,
kvankam ĝi kostis ĉiom
super la kalkulebla prezo.

Ree la strangan belskatolon vi malfermis:
vortoj, reguloj
el via cerbmistero kaj la karno,
kies glandobobenoj
ŝpinis por ni la poemegon
lingvon unike
unuigantan kulturojn
multjarmilajn de Mediteraneo
kun tuŝetoj el regionoj transe,
kie la amo kaj konsterno
de via gento (pli antikva
ol Romianoj intertempe forviŝitaj)
plu serĉadis la netroveblan pacon,
kaj trapalpis en diasporo
pasintecan pri kiu oni
nur konjektas sed neniam elscios —
ĉiukontinente, sur blinda spuro.
Vortoj, reguloj,
kiuj ĉiugente al paco sanigas,
jam ne ligotaj nur al vi,
sciata esti kiel folioj
de la arbo ekstere
frapetantaj fenestrovitrojn,
dum tralavis momenta lumo
kaj agonia vento.

Ĉu vi povus imagi, Zamenhof,
ke viaj paradigmoj
preter la teksto
baldaŭ generos Bulonjon,
Ido-dolorojn
kaj la poetojn?

Vi estis multe pli granda ol ni,
ĉar sen vi ni ĉiuj — la efektive gravaj
kaj la eminentaj nur proprakonvinke —
montriĝus
nulaj, malestaj por afero grandioza:
homoj ne distingindaj, nekonataj
unuoj al la aliaj,
fortranĉitaj de io
kio esence nin igas ni.
Kiel ankoraŭ la planedo
da mirinduloj, kies vortoj
brile juvelas nur ĝis la komprenolimoj,
frakasigante

kontraŭ la muroj de silento
inter la koroj.
Tiel, por adresi la mondon,
fine ni mem fariĝus nur
fragmentigitaj
eroj de kanto
balbutata urĝe sed neaŭdeble
en la surdigan fremdon,
kie centas kaj milas la lingvoj.
Eble ni simple mutus.

Personecoj (inter pli multaj)
kiel la brila kaj ĉagrena Kalocsay,
Ragnarsson de la iom trola ĉarmo,
stalaktite subtera,
aŭ la juntempe batalema,
fine tro milda Auld,
aĉe traktita far eksamikoj —
ili ĉiuj (ho kiel strange!) ne estantaj,
krom fremdole: Hungaro,
Islandano kaj Skoto
disaj, laŭ parodiaj alternativoj
de la ekzisto
(eble, kvankam ne nepre, poetoj),
retroŝovitaj
en siajn rondojn obskurajn,
oscedigantoj sen intereso aŭ rilato
al la pli vasta mondo,
kiu giroskopus ĉiam antaŭen
tra la spacaj profundoj
en destinton alian
de la troa tenebro.

Kreskis el viaj paĝoj, Zamenhof,
per la malvolviĝinta lingvo
kiu trans landoj, moroj,
strangasorĉe kunigas,
tute nova popolo jam jarcenta,
ne multnombra (kvankam unika),
kia ne troviĝis antaŭe.

El tiuj paĝoj,
preter la nuna homsezono —
ĉu post jarcento pli, trans nia polvo? —
iu konstanta forto nevideble
aliorbiten
puŝos planedan historion,
mondonacie
unuhomaran.

Certa Julia posttagmezo
en Varsovio.

1987 05 20

Probal Daŝgupto (Bharato):


Per nova unueco-principo antaŭen en la Tria Mondo

La Bharata Nacia Kongreso, kiun poste gvidis Mahatma Gandhi kaj kiu simbolas la luktadon de la aziaj kaj afrikaj popoloj por nacia, ekonomia kaj kultura memstrareco, ekestis en 1885, kaj Esperanto en 1887. Se ni traktu tiujn kiel la naskojarojn de la Tria Mondo resp. la Dua Lingvo, estas do necese rimarki tuj, ke en la komencaj jardekoj la du novaj movadoj pli-malpli ignoris unu la alian. Ambaŭ strebis atingi difinitajn celojn rilate al la metropola Unua Mondo, provizore lasante ekster la atento ĉion alian.

Oni povus pensi, ke nun la situacio ŝanĝiĝis. Aperis iom gravaj Esperanto-movadoj en Azio en la sepdekaj jaroj, en Afriko en la okdekaj. La irana pioniro Saheb-Zamani (kun nomo parte anagrama je Zamenhof) prezentis miraklan kaj modelan lanĉon de movado; kaj pluraj aliaj landoj, kvankam pro apartaj kaj malsamaj impulsoj, tuj poste lanĉis siajn, en tia sinsekvo ke estis malfacile epiteti la sinsekvon "koincida" aŭ "hazarda". Oni rajtas fidi, ke pli aŭ malpli baldaŭ, per pli aŭ malpli serpentuma vojo, la afero iros antaŭen en la Tria Mondo.

Tamen, la premisoj de la komenca reciproka ignoro fantomas nin plu. La pioniroj de la Dua Lingvo volis unuavice varbi anojn de la "civilizitaj" regnoj, se ni uzu la tiajn vortojn. Kaj la iniciatintoj de la memstariĝo de la Tria Mondo rigardis la "imperiisman" Eŭropon kiel malamikon. Nuntempaj esperantistoj grandparte restas kaptitaj en simila nepovo efektive akcepti la ideon, ke la vestoj,

Probal Daŝgupto — nun lingvisto en Pune, Hinda Unio — troviĝas inter tiuj tre, tre malmultaj esperantistoj kiuj evoluigis tuje rekoneblan prozan stilon. Ni rekomendas minimume dufojan legadon de la teksto por laŭmerite ĝui ĝin! Cetere ĝi enkondukas temon, kiu respeguliĝas en la postaj artikoloj.



muzikaj stiloj, literaturoj aŭ ideoj de la Tria Mondo povus esti vere egalrangaj, "civilizitaj". Kaj siaflanke multaj triamondanoj, kiujn oni provas varbi en la Duan Lingvon, restas suspektemaj pri la eŭropeco kaj do imperia kontaĝo de Esperanto. "Se ni devas akcepti la okcidentan lingvan hegemonion," ili pensas, "ni prefere lernu la verajn imperiajn lingvojn, kaj ne tiun ĉi ŝajne neŭtralan aliformigon de ili." Oni do devas skeptike rilati al la senplia espero, ke la Tria Mondo estos la scenejo de la fina venko. Estas kontraŭfaktoroj en la strukturo de la interciviliza renkontiĝo.

Se mi tamen restas optimisma pri la kuna estonteco de la evolulandoj kaj la planlingvo, tio estas pro kialoj ne mondaĵ, sed "kosmaj", kiel nun klariĝos.

Mi nomas "kosmo" la komunikan kaj kunlaboran eblo-zonon, kiun kreas ĉirkaŭ si ĉiu grava interlingvo. La siatempaj kosmoj de Latino, de Sanskrito, de la ĉina, de la araba estis regionaj kosmoj, ĉar la ĝistiam evo-luo de la trafiko ne permesis la ekeston de vere tutgloba kosmo. La modernaj kosmoj de la franca kaj poste la angla atingas transregionan amplekson. Sed, simile al la antaŭaj, ĉi tiuj kosmoj ŝuldas sian unuecon kaj potencon al la premo de forto, ne al la spontana konverĝo de konsento, pri kiu oni kantas "La popoloj faros en **konsento**/unu grandan **rondon** familian". Ĉi tial, estas laŭ mi erare kompari la aktualajn kosmojn (la ĵusan de la franca aŭ la nunan de la angla) kun la proponata kosmo de Esperanto; estas kvazaŭ kompari ŝtatojn kun literaturoj. La franca kaj la angla heredas, planed-skale, la provizorajn hegemoniojn de iamaj regionaj lingvo-potencoj; Esperanto enkondukas novan principon de unueco.

La religia kaj civiliza forto de la antikvaj interlingvoj regione kuntenis iliajn kosmojn. Ĉe la franca, aperas **kultura** unueco, kun universalopretenda **elito** portanta ĝiajn sciencajn kaj artajn valorojn kaj eksportanta la premon de ilia prestiĝo ĉien. Tio jam kliniĝas al la evoluanta neceso akiri almenaŭ pasivan akcepton ĉe la regataj socioj. Kun la angla ni havas la novan akcenton de **popularismo**, kiun subtenas la ordo de multnaciaj entreprenoj kaj la personizita intimeco de la persvadaj komunikiloj reklamantaj komfortan kaj interesan ekziston. Tio ĉi pelas ankoraŭ plu la procezon de la graviĝo de la akcepto, kvankam restas la hegemonia aŭ prema stilo — la angla perbuĝete fabrikas la konsenton, dum la franca perprestigiĝis ĝin. Zorge studante tiujn ekzemplojn de la modernaj metodoj, per kiuj **iu** regas **aliajn**, ni povas embrie kaj mikrokosme (termino de Detlev Blanke) ekkompreni, kaj en nia mikrokosma eksperimentado ekpraktiki, la postmodernan stilon, laŭ kiu **ĉiuj** regos **sin**, en reciprokeco, kiun subtenos ĝenerala eksmodiĝo de la hierarkiaj metodoj.

Finfine, estas dinastiaj rajtoj, kiuj legitimas la hegemoniojn. Esperanto esprimas la malakcepton de la patriarkaj premisoj de tia legitimeco. Kiel la ciganoj, aŭ aliaj sendinastiaj kosmopolitoj, la esperantistoj ne havas denaskajn aŭ proprietajn rajtojn, sed nur tiujn de gasto. Nian literaturon konstruis kaj progresigas mondliteraturaj legantoj, kiuj lernis gastu unu ĉe alia, montrante, ke la amikeco kapablas fortike ponti: "Tenos ĝi vin/ tenos ĝi vin/ kiam ŝtalo rompiĝos."

Ke la persona amikeco povas esti efektiva unuecilo je transregiona skalo, tion dubas pluraj miaj amikoj en Esperantujo, kiuj pli fidas je la strukturaj faktoroj. Sed eĉ en la nuna transiro al la silicia tekniko en triamondaj landoj, la novaj gvidantaroj emfazas la apartecon de siaj kulturaj volo kaj rezistas la kulturan poluadon ligitan pli frue kun la disvastigo de la moderna okcidenta tekniko.


Antaŭe, la Tria Mondo rezigne akceptis la modernigon; nun ĝi moderniĝas, fortigante ne nur la trunkon sed ankaŭ la radikojn de sia moderna evoluanta al postmoderno. Tiu faktoro de la spontana volo ja apartenas al la "strukturo", pri kiu miaj amikoj havas eble tro "ŝtalan" bildon. Detlev Blanke prave akcentis, ke la **konscia elemento** faras Esperanton kerne grava al la moderna spirito, kiu volas krei sian sorton. Ju pli la triamondaj civilizoj aplombe konscias pri siaj rajtoj, pri la rajtoj de la senhereduloj, des pli kreskos "strukture" la mondaj ŝancoj de planlingvo.

Sed ĉu de Esperanto prefere ol alia, malpli regione stampita projekto? Tio revenas al la centra principa demandaro. Ni memorigu nin pri la zamenhofaj argumentoj en *Esenco kaj estonteco*, kiuj restas validaj. Se la monda komunumo decidas, iom post iom, adopti neŭtralan planlingvon, tiam pro la konsideroj de facileco, natureco, nemalŝparo de haveblaj rimedoj k.s. oni pli-malpli devos uzi la vortojn, kiujn la eŭropa imperiismo disvastigis, ĉar tiu vortostoko estas la sola, kiu havas la necesan multregionan konatecon, kaj ĉar necesas, por ke iu lingvo estu facile lernebla kaj nature uzebla, ke ĝi havu "animon" aŭ karakterizan formon, al kiu la komunuzaj internaciaj vortoj ne

aspektos fremdaj, sed kiu tamen ne tro specife portas la stampon de tiu aŭ alia etna lingvo. Do, ekonomiaj kaj ekologiaj rezonadoj konverĝos al la solvo Esperanto, se principe adoptiĝos planlingvo.

Rilate al tiu seo, oni povas resti ĉe la tezo de Ivo Lapenna, ke la monda interlingva situacio evoluas al malfacile mastrumebla krizo — kiun eĉ ne la

maŝintraduko per si mem solvos, ĉar estas ĉiam pli konvene havi unu neŭtralan lingvon, kiu peras tiajn tradukojn inter granda aro da fontaj kaj celaj lingvoj. Krom tiu teknika krizo, kreskos interciviliza malekvilibro, kiam la evidentan japanan sukceson sekvos la jam burĝonantaj sukcesoj de aliaj memkonsciaj kulturoj de Azio kaj Afriko. Sukcesaj kulturoj malvolonte akceptas la hegemonion de aliulaj lingvoj, precipe se florantaj kultur-renoviĝoj forŝovas la iaman pintecon de la okcidenta kulturo. Iom post iom, sed sendevie, evoluas situacio, en kiu la oligarkio de kelkaj grandaj lingvoj ne restos akceptebla monda ordo, kaj ĉiam pli realisma ŝajnos la nun utopia propono adopti planlingvon por ĝenerala monda uzo. Dume, la longan intertempon verŝajne uzos triamondaj enirantoj en la Esperantan kulturkreatan sferon por iom post iom harmoniigi la evolulingvon kun la apartaj konscioj (kaj nekonsciaj songostiloj) de la evolulandoj. Ni komencas ekscitan fazon en la longa evoluo. Ni ne tro ĝenu nin pri imperiismoj, kiuj krom subpremi rajtojn ankaŭ aluvie lasas sur la tero formajn kaj kulturajn unuecaĵojn; iam, post la cindriĝo de nun intensaj pasioj, tiuj unuecaĵoj aspektos anonimaj kaj akcepteblaj, kaj senkolere uzos ilin la tiama "rondo familia" por ankoraŭ pli fortike forĝi neŭtralajn pontojn inter la kulturoj. La frua Esperanto lernis de la franca kosmo; ni hodiaŭ lernu de la angla, sen honto aŭ maltrankvilo, kaj komprenante, kion ni faras kaj konstruas.



Pordo por Ĉinio al scienc-teknika interŝanĝo kaj evoluo

Frue en la Jubilea Jaro mi skribis al s-ro Ŝen Ĉenru, redaktoro de la revuo Tutmondaj sciencoj kaj teknikoj kaj vicprezidanto de la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj. Jam frapis min la evidenta emfazo en Ĉinio pri la praktika, faka aplikado de Esperanto, kaj mi scivolis pri la fono de tiu situacio kaj pri la perspektivoj kiujn ĝi proponas por la estonteco de nia lingvo. Jen redaktita versio de nia skriba interparolo.

MF: *Oni facile supozas, ke la problemoj en komunikado inter Ĉinio kaj la cetera mondo estas aparte gravaj en la kampo de scienco, kie la vaste uzataj lingvoj sufiĉe malsimilas al la ĉinaj. Ĉu tio efektive minacas postrestigi Ĉinion, kaj ĉu oni ĝenerale konscias pri tiu lingva problemoj?*

SC: En la antikveco Ĉinio antaŭiris en scienc-teknika kampo kaj per siaj multaj inventaĵoj influis la mondon, sed en la moderna epoko ĝi postigis, kvankam ĝi faris grandan kontribuon al la homaro en kelkaj aspektoj — ekzemple en spaconaviga tekniko kaj farado de insulinoj. La ĉefa kialo estis "kaŝiĝi en sia ŝelo" kaj "sin fermi en rutino". La ĉina registaro nun aplikas pordomalferman kaj reforman politikon kaj plifortigas la rilatojn kun diversaj landoj. Nun la lingva baro fariĝis ĉefa problemoj. Oni soife lernas fremdajn lingvojn. Delonge en Ĉinio la angla lingvo estas lernata kiel la unua fremdlingvo. Iam la rusa, japana, franca, germana kaj hispana ricevis atenton.

Kompare kun ili, Esperanto grandskale disvastiĝis nur en la lastaj jaroj.

MF: *Ĉu multaj ĉinaj kleruloj kredas, ke lernado de la angla solvos la komunikan problemon?*

SC: Oni ĝenerale opinias, ke la angla estas internacia lingvo. Posedante ĝin oni jam povas trairi la tutan mondon. Fakte ekzistas multaj objektivaj kondiĉoj favoraj al la lernado de tiu lingvo. Laŭ la difino de la Ĉina Eduka Ministerio, oni komencas instrui la anglan en mezaj lernejoj, eĉ en iuj elementaj lernejoj. Abundas lernolibroj, referencaj materialoj, elektraj aŭdovidaĵoj... Pro tio kreskis nemalmultaj kapabluloj pri la angla lingvo. Tamen estas tre malfacile lerni tiun lingvon, ĉar ĝia strukturo estas komplika kaj ĝia uzo, tro fleksebla. Fakte multaj personoj lernas dum sia duona vivodaŭro, sed ankoraŭ ne povas uzi ĝin. La estraro de la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj multaj eminentaj sciencistoj profunde spertis tion. Ili opinias, ke por evoluigi sciencon kaj teknikon oni bezonas interŝanĝon, kaj por tio oni devas posedi lingvojn. Tial la estraro de la akademio foje-refoje alvokis sciencistojn kaj teknikistojn lerni Esperanton kaj donis al nia asocio grandan subtenon.

MF: *Kia estas la sinteno de neesperantistaj sciencistoj al Esperanto? Ĉu oni taksas ĝin grava, aŭ ĉu periferia, kiel oni kutime juĝas aliloke en la mondo?*

Librorondo "Stafeto", la nepro por la libroamanto!

Ĉu allogas vin la ideo ricevi literature kaj prese bonkvalitajn Esperanto-librojn tuj post ilia apero kontraŭ forte rabatita prezo? La librorondo Stafeto donas al vi tiun eblecon.

Kion ni ofertas al vi? Ni ofertas al vi bele presitajn literaturajn kvalitajn verkojn de konataj nomoj kiel Johán Valano, Gaston Waringhien, William Auld... Vi ricevos la verkojn aperintajn en la serio Stafeto antaŭ ol ili estas haveblaj ĉe la kutimaj libroservoj. Ni principe strebas al aperigo de tri libroj jare. Plie, vi aŭtomate ricevos rabaton de 10% se vi mendas po unu libron, rabaton de 40% se vi mendas po tri librojn aŭ pli.

Kion ni petas de vi? Por aliĝi al nia librorondo ni petas unufojan kotizon de 1000 belgaj frankoj.

Kio estas via garantio? Vi rajtas retiriĝi el la librorondo. En tiu kazo vi rericevos vian kotizon de 1000 belgaj frankoj kaj ni ne plu sendos al vi librojn. Se vi estus malkontenta pri specifa libro, vi havas la rajton resendi ĝin ene de ok tagoj, ne devante klarigi la kialon.

Jam aperis aŭ tuj aperos... Johán Valano: *Ĉu rakonti novele?* — William Auld: *Sub la signo de socia muzo* — Gaston Waringhien: *Beletro, sed ne el katedro* — Deck Dorval: *Kazinski venas tro malfrue*

Petu aliĝilon de Flandra Esperanto-Ligo, sekcio Stafeto-libroj, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio



SC: "Ĉu Esperanto estas utila?" — tio estas demando, kiun ni ofte aŭdas. Nia respondo estas jesa. Ekde la fondiĝo de nia asocio, ni ĉiam uzas Esperanton. Ekzemple, ni funkciigas kursojn, publikigas revuon, korespondas kun en- kaj eksterlandaj kolegoj, akceptas fremdlandajn esperantistojn, okazigas internacian akademian konferencon, partoprenas en UK, vizitas aliajn landojn, interŝanĝas scienc-teknikajn librojn kaj materialojn ktp. Ni trovis, ke ekster nia atendo la uzamplekso de Esperanto estas tre vasta kaj ĝia efiko tre evidenta.

Tamen ni devas konfesi, ke Esperanto nur debutis en scienc-teknika kampo. En esperantistaj rondoj la apliko de Esperanto en tiu kampo ankoraŭ ne gajnis sufiĉan atenton. En scienco kaj tekniko Esperanto ne estas komparebla kun la angla lingvo. Ĉinaj esperantistoj intencas uzi Esperanton en scienc-teknika kampo, sed ili ne havas ŝancon. Ekzemple, ne ĉiuj povas trovi esperantistajn kolegojn; ne ĉiuj povas trovi materialojn verkitajn en Esperanto pri sia fako.

MF: Ĉu vi opinias, ke tiu utiligo de la lingvo estas la ĉefa motivo de ĉinaj sciencistoj, lerni Esperanton?

SC: La lernomotivo de ĉinaj sciencistoj ja estas malsama al tiu de nesciencistoj. La lastaj lernas Esperanton eble nur celante posedi komunikan ilon por korespondi kun fremdlandaj amikoj, koni la mondon, plimultiigi sciojn, plialtigi sian kulturen nivelon aŭ starigi amikecon. Sciencistoj lernas Esperanton ĉefe por akademia interŝanĝo kun alilandaj kolegoj laŭ siaj fakoj. Aktuale ni vivas en epoko de informa eksplodo, kaj la uzado de Esperanto en scienc-teknika kampo estas bezonata por informa interŝanĝo,



La lanĉo de Tutmondaj sciencoj kaj teknikoj en 1985 estas eble unu el tiuj ŝlosilaj eventoj, kiujn postaj historiistoj konvenciigas kiel komencon de epoko. Ja Esperanto povus signifi revolucion en informinterŝanĝo por la evoluantaj landoj — pri kio vidu ankaŭ la apudan artikolon pri nia "movado de hodiaŭ".

ekonomia evoluo kaj progreso de la homaro. Ni alvokas diverslandajn esperantistojn kune klopodi por disvastigi Esperanton, ĉar Esperanto ne povas ludi rolon nur en unu lando. Ni esperas, ke UEA kaj aliaj internaciaj Esperanto-asocioj faros siajn kontribuojn al tiu aspekto.

MF: Kiuj kontribuoj estus por vi plej gravaj kaj utilaj?

SC: Sen fakaj eldonaĵoj sciencistoj kaj teknikistoj ne povas persiste lerni Esperanton. Oni devas kolekti monon por havi sufiĉan nombron de eldonaj fondusoj kaj altigi la honorarion. Post tio, oni alvokas diversfakajn esperantistojn kiel eble plej multe verki sian disertacion en Espe-

ranto. Nur tiel Esperanto fakte, ne filozofie, estos prenata kiel la dua fremda lingvo kaj iom post iom fariĝos la Internacia Lingvo en la vera senco.

Laŭ nia opinio la plej urĝaj sciencaj eldonaĵoj estas: scienc-teknikaj vortaroj aŭ diversfakaj vortlistoj, necesaj por legado kaj tradukado de akademiaj verkoj; freŝaj informoj pri la plej novaj sciencoj kaj teknikoj, inkluzive de esploraj fruktoj kaj eksperimentaj raportoj; popularaj sciencaj legaĵoj. Ni devas komenci de la plej urĝaj aferoj: unue popularigo kaj poste plialtigo. Se niaj eldonaĵoj respondas al la bezonoj de vasta legantaro, la vendado estos senproblema.

Antaŭ nelonge nia asocio fondis redakcion de Esperantaj sciencaj libroj, kiu konsistas el specialistoj pri Esperanto kaj altrangaj sciencistoj, kaj tuj komencis redakti scienc-teknikajn vortarojn kaj librojn. Ni planas eldoni en la venontaj du-tri jaroj Esperanta-angla-ĉinajn vortarojn pri medicino, terscienco, meteorologio, mikrobo-genetiko kaj komputiko, kaj aliajn sciencajn legaĵojn.

MF: Kion do vi atendas de la Esperanto-movado en la scienc-riĉaj landoj, por plej efike akceli la aplikadon de Esperanto komence de ĝia dua jarcento?

SC: "Centmil paŝojn voĵ' havas, la unua tre gravas." Ni esperas, ke diverslandaj esperantistoj unuiĝos kaj kune klopodos por tiu celo.

Unue, ni devas allogi kaj mobilizi sciencistojn kaj teknikistojn, precipe altrangajn, ke ili lernu Esperanton. Post unu- aŭ du-jara lernado ili akirus kapablon interŝanĝi sciencojn kaj teknikojn rekte en Esperanto, verki kaj traduki sciencajn disertaciojn kaj partopreni en internaciaj konferencoj.

Due, ni devas kolekti monon por subteni eldonadon de Esperantaj sciencaj libroj. Estas bonvenaj donacoj, rekomendoj aŭ mempaga eldonado. Monkontribuo povas esti sendata al la Pekina Branĉo de la Ĉina Banko, n-ro 71404656, Geologia Instituto, Academia Sinica. Ni esprimos nian dankon per sendo de eldonitaj libroj kaj revuoj aŭ en aliaj manieroj.

Trie, ni aktive preparas la duan internacian akademian konferencon pri scienco kaj tekniko en Esperanto, okazontan de la 10a ĝis la 16a de aŭgusto 1988 en Pekino. Laŭ la sperto de la unua konferenco en 1986, ankaŭ la dua estos diversfaka. Estas grave altigi la lingvan nivelon: partoprenantoj devas anticipi prezenti sian referaĵon verkitan en Esperanto, voĉlegi ĝin kaj respondi demandojn en la konferenco. Evidente eksterlanda partopreno estos tre grava.

Kvare, la ĉinaj urboj Anshan, Yantai, Yanji kaj scienc-esploraj institutoj de la Ĉina Akademio de Sciencoj deziras kunlabori kun diversaj landoj en interŝanĝo ekonomia, komerca kaj scienc-teknika. Lastatempe ni ricevis monhelpon de la Medicina Akademio de Pollando por sendi fakulojn al Krakovo por partopreni en la medicina Esperanto-konferenco. Ni ankaŭ serĉas vojon al internacia kunlaboro por okazigi akupunkturajn trejnan kurson en Esperanto. Tiuj, kiuj interesiĝas pri interŝanĝo, povas kontakti kun s-ino Wang Yuchun, Esperanto-Asocio, 52 Sanlihe, Academia Sinica, Beijing, Ĉinio.

"Per laboro kolektiva, por sukceso perspektiva!" Ni kune klopodu por vaste apliki Esperanton en scienc-teknika kampo.

Ne hieraŭ aŭ postmorgaŭ, sed hodiaŭ!

La esperantistoj fariĝis lingvo-sekto." Tiel la renomata ĵurnalo *Die Zeit* el FR Germanio karakterizis la Esperanto-movadon en artikolo aperinta en februaro ĉijare. Per tiu juĝo la aŭtoro kontribuis treni la publikan opinion en maloportunan angulon: Esperantistoj postkuras iun idealon kiu antaŭ cent jaroj intencis konkeri la mondon sed kiu malsukcesis; tamen nun manpleno da idealistoj pene sed vane baraktas kontraŭ la realaj cirkonstancoj de la nuntempo.

Prioritata tasko de la Esperanto-movado devas esti, eviti la disvolviĝon de tiaj misgvidaj karakterizoj. Tion ĝi povas atingi nur per saĝa informa laboro. Eraro estus ekzemple propagandi la "finan venkon" de Esperanto, post kiu la tuta mondo paciĝus en harmonio. Komuna lingvo ne solvas ĉiujn konfliktojn inter la popoloj. Ĝi nur ofertas rimedon interkompreniĝi. Se la Esperanto-movado taksas

Esperanto tiel donante al li diecajn trajtojn. Zamenhof ne kreis Esperanton, li iniciatis ĝin. Post 1887 Esperanto pluevoluis dum tuta jarcento. Ĉefe tiu jarcento da vivo kaj ne la Unua Libro igis Esperanton esti lingvo.

Per tio mi ne intencas malrespekti Zamenhofon, nur averti pri la efiko eksteren informante pri Zamenhof, ĉar — kaj jen ripetiĝas la argumentado — se la Esperanto-movado prezentas la personecon de Zamenhof tro glora, serioza, la publiko ne plu taksas lin serioza sed konsideras lin la eks-gurao de tiu Esperanto-sekto.

La slogano "Esperanto — dua lingvo por ĉiuj" ne taŭgas por la ekstera informado. La slogano entenas absolutan postulon: ke ĉiu ajn individuo lernu Esperanton. Sed ekzistas multaj homoj, kiuj ne vidas neceson por si lerni Esperanton, eĉ se ili kutimas vojaĝi eksterlanden.



Thomas Bormann (dekstre, sur biciklo), triageneracia esperantisto kaj studento pri ĵurnalismo, montriĝis unu el la plej viglaj aktivistoj en junularaj rondoj dum la lastaj jaroj. En lia ĉi-kuna teksto speguliĝas tia maltrankvilo kaj kritikemo, kian tradicie provizas movada junularo. La Jubilea Jaro portas pozitivan informan ondon — sed ĉu ni scios rajdi ĝin?



sin tro serioza, ĝi riskas, ke la publiko absolute ne plu taksas ĝin serioza, sed sekteca.

Sektojn oni povus karakterizi jene: Ili restas daŭre malgrandaj, havas opinion aŭ kredon diference de la regula, kaj pretendas posedi la kompletan veron. La adeptoj de sekto volas konvinki ĉiun ajn individuon pri la ĝusteco de siaj ideoj. Paraleloj al la Esperanto-movado ŝajnas evidentaj, almenaŭ supraĵe vidite — kaj la publiko kutime nur supraĵe aŭdas pri Esperanto.

En ĉi tiu artikolo mi do traktos kelkajn aferojn, kiuj havas — aŭ povus havi — grandan efikon sur tiu supraĵa aspekto, ĉu negativan, ĉu pozitivan.

Al la mito de "fina venko" aldoniĝas akcesoraĵoj de la Esperanto-movado kiel la flago aŭ la himno, kiujn la ekstera publiko povus miskompreni kaj konsideri sektecaj. Ankaŭ la personkulto ĉirkaŭ Zamenhof, jen kaj jen spertebla en kelkaj Esperanto-grupoj, malbone impresas ĉe la publiko. Foje iuj nomas Zamenhof eĉ "kreinto" de

Pensu ekzemple pri la milionoj da turistoj el Germanio, kiuj ĉiu-somere vojaĝas al la Mediteraneo por ferii dum tri semajnoj. Tiuj turistoj plejparte ne serĉas kontakton kun fremdaj kulturoj kaj popoloj. Se ili estas ekzemple en Barcelono, ili ne volas pridiskuti la vivon kun la tieaj civitanoj. La turisma industrio ofertas al siaj klientoj abundajn servojn, por ke eĉ en fremda lando oni "sentu sin hejme": kelnero parolu germane, oni provizu germanajn manĝojn, kaj en la hotelo estu aĉeteblaj germanaj gazetoj. Verŝajne tiuj turistoj eĉ ne konscias, ke ili troviĝas en la kataluna parto de Hispanio. Ili volas simple ripozi, ĝui la sunon kaj la maron. Eble ili ankaŭ ŝatas konatiĝi kun aliaj homoj, sed prefere tiuj estu aliaj turistoj el Germanio.

La Esperanto-movado devas toleri tiujn homojn, kiuj respondas al niaj argumentoj: "Viaj internaciaj kontaktoj estas imponaj, sed tio ne interesas min. Mi ne volas lerni Esperanton." Klopodi konvinki tiujn homojn signifus vana laboro, kaj cetere la Esperanto-movado aperus kiel grupo da misiistoj.

Sekto kutime havas iun ĉefan malamikon, ion aŭ iun malbonan, diablan. Ankaŭ ĉi-kampe ni trovas paralelaĵon en la Esperanto-movado: la agitadon kontraŭ la angla lingvo. Ja estas danĝere por malpli grandaj kulturoj, se iu lingvo dominas la tutan mondon kaj influas la vort-trezorojn de ĉiuj aliaj lingvoj. Sed estas nek la zorgo nek la celo de Esperanto faligi la anglan.

La roloj de la angla kaj de Esperanto ne estas kompareblaj. La angla servas kiel lingvo de komerco kaj kiel help-lingvo por turistoj. Esperanto havas alian funkcion: Per ĝi eblas sendiskriminacia komunikado je alta nivelo. Pro sia facileco Esperanto rapide donas al la parolanto la eblecon diskuti eĉ komplikajn temojn.

Esperanto ne havas ŝancon nuntempe enpenetri grand-skale la sferojn kie dominas la angla. La angla estas firme

Esperanto eblas pli profundaj personaj diskutoj kun homoj el multaj **diversaj** landoj; diskutoj je sendiskriminacia nivelo, ĉar por neniu Esperanto estas la gepatra lingvo.

La informa laboro de la Esperanto-movado devas celi, ke la ekstera mondo konsideras nin funkcia inter-nacia kultura organizaĵo. Ni devas rompi nian fermitecon, ne aperi kiel movado de antaŭhieraŭ, kiu postkuras iujn idealojn el la jaro 1887. Ni same ne aperu kiel movado de postmorgaŭ, kiu konstante revas pri la paradiza mondo post la "fina venko".

Ni devas aperi kiel movado de hodiaŭ; movado, kies anoj tenas vastajn internaciajn kontaktojn, interesiĝas pri fremdaj kulturoj, ŝatas vojaĝi; movado kun praktikaj valoroj hodiaŭ. Kiel delegito de UEA aŭ kiel gastiganto de Pasporta Servo, ĝuas praktikajn valorojn de Esperanto ankaŭ tiuj, kiuj ne disponas pri la tempo kaj mono por vojaĝi. Pliajn eblecojn je internaciaj kontaktoj proponas korespondado, legado kaj la Esperanto-radiostacioj.

Pri ĉiuj tiuj praktikaj valoroj la Esperanto-movado fieru. Sur tiuj valoroj la movado bazu sian memkonscion. Ni montru al la publiko la funkciadon de Esperanto. Ĉiu eksterlanda gasto vizitanta vin estas pruvo pri la funkciado de Esperanto. Tio impresas ĵurnalistojn. Se ĵurnalistoj propra-orele spertas Esperanton, ili rimarkas ĝian aktualan taŭgecon kaj ne ekmokos pri ĝi.

La Esperanto-movado aperu kiel organizaĵo, kiu proponas siajn servojn — internaciajn kontaktojn — al la publiko; same kiel Zamenhof proponis sian lingvan projekton al la homaro.

Al la supre menciitaj aktualaj valoroj de Esperanto, kiuj solidiĝis en la unua jarcento de la lingvo, necesas aldoni novajn taskojn. Tiel Esperanto aperos eĉ pli alloga.

Ambicia, sed tre grava kaj realisma nova tasko estus respondi al la deziroj de Esperanto-studentoj en la Tria Mondo. Ili ŝatus uzi Esperanton por siaj fakaj studoj. Por tio necesus lernolibroj kaj sciencteknika literaturo en Esperanto. Tion postulis d-ro M.H. Saheb-Zamani, elstara irana intelektulo, en intervjuo aperinta antaŭ dek jaroj en tiu ĉi revuo. Li diris: "Mi alvokas la science kaj kulture riĉan okcidenton pliampleksigi finfine sciencteknikan literaturon en Esperanto anstataŭ forverŝi la tempon por intelektulaj disputoj." Saheb-Zamani per tio montris vojon, kiel "per Esperanto liberiĝi de la sciencteknika malriĉeco en la Tria Mondo". Tamen, pasis jardeko de post la vortoj de Saheb-Zamani, kaj nenio okazis. Kvankam en majo 1980 la revuo *Esperanto* raportis, ke en Irano 675 geinstruistoj lernas Esperanton, la kolekto de sciencteknikaj libroj en Esperanto aspektas same mizera kiel antaŭ dek jaroj.

Ekzistas multaj sciencistoj de ĉiuj fakoj en la Esperanto-movado. Devus esti eble kunordigi iliajn kapablojn kaj eldoni sciencteknikan literaturon. Tio estu unu el niaj grandaj taskoj por la dua jarcento. Tiel Esperanto ofertus unu plian praktikan servon al la mondo, kiun oni fiere povus prezenti al la publiko.

Resume jen konsilo al la Esperanto-movado: En sia informa laboro ĝi ne elstarigu, kiom **povus valori** Esperanto (estiĝonte dua lingvo por ĉiuj), sed kiom ĝi efektive **jam valoras**.

1987,

okaze de la centjariĝo de Esperanto,
jen aktuala legolibro el kritikema nuno
por vivinda morgaŭo:

ANTAŬ LA NOVA JARMILO

IDEOJ POR LA VIVO

EL MONDO MINACATA

Pli ol 90 kontribuaĵoj
el preskaŭ 30 landoj sur 500 paĝoj!

Nun mendebla ĉe Esperanto-Centro Paderborn, poŝtfako 1450, D-4790 Paderborn, FRG (42,— GM) aŭ ĉe la libroservo de UEA (52,20 gld.). **ISBN 3-922570-46-1.**

enradikiĝinta kaj ĉiu-tage pli solidiĝas, ĉar ĉie sur la globo milionoj da infanoj lernas ĝin, dum Esperanton oni instruas nur escept-okaze. Tial la postulo de la Esperanto-movado enkonduki Esperanton por ĉiuj internaciaj rilatoj estas taksata nerealisma.

Ankaŭ ĝenerale per argumentado kontraŭ la angla la Esperanto-movado ne rikoltos multe da subteno. Almenaŭ en nordokcidenta Eŭropo pli kaj pli enradikiĝas la ĝenerala imago, ke la angla estas la mondlingvo, parolata "preskaŭ ĉie". Dum enketo 44 procentoj de la civitanoj de FR Germanio jesis al la demando "Ĉu vi parolas la anglan?" Kvankam tiu jeso en multaj kazoj certe signifas nur, ke la koncerna homo iom balbutas la anglan por eksterlande trovi la vojon al la stacidomo, la Esperanto-movado ne forprenu de tiuj homoj la iluzion ke ili parolas la anglan. Dum jaroj tiuj homoj lernis la anglan en la lernejo. Ili ne ŝatas aŭdi de la Esperanto-informantoj, ke tiu lernado estis vana.

Kiam iu ĵurnalista venas al ni kun la fama demando "Kial ne la angla?", ni respondu, ke la du lingvoj havas malsamajn funkciojn en la nuntempo. La angla ĉefe utilas por orientiĝi en aliaj landoj, demandi pri la vojo; per

Kaj tamen: Esperanto estas pli ol lingvo!

Permesu al 45-jarulo korekton de eldiroj kaj pensado, faritaj antaŭ multaj jaroj, en la junaĝo. Enirinte la internacian Esperanto-movadon meze de la 60aj jaroj, mi energie kontraŭstaris kaj strikte kontraŭargumentis ĉiajn idealoj kaj spiritajn valorojn de nia lingvo kaj ĝin traktis nur komunikilo, kiu servas al ĉiu ĝin parolanta. Kiel eldonanto de la unuaj numeroj de *Der esperantist* mi kelkfoje elpaŝis mem kaj artikole kaj satire tion substrekis. Mi evitis pro tio la vorton "samideano" kaj suspektis ĉiun anon de "interna ideo" politike reakcia.

Trafoiumante paperojn de mia 30-jara esperantisteco kaj fosante en miaj engramoj, ĉion ligante kun profesiaj spertoj kiel psikiatro kaj psikoterapiisto, mi konkludas en la jaro 1987 tute alie: Esperanto por mi hodiaŭ estas pli ol nura lingvo. Ĝi estas la fokusita modelo de la nova homa pensado, kiun la homaro bezonas por transvivi sian plej danĝeran evolustadion, kiu karakteriziĝas interalie sed ĉe-

NIA MONDO

estas parto de la kosma evoluo. La homoj devas partopreni en profunda meditado por disvastigi spiritan harmonion. Ni devas konservi ĉiujn religiajn instruojn, kiuj celas al harmonio inter la popoloj. Se ni pensos kosme, niaj ĉi-mondaj problemoj malpliigos kaj estos perspektivo por vera paco.

Mi ankau pensas, ke ni bezonas pli bonajn, viglajn familiajn vivojn en nia socio.

Mi sercas helpon por la drogaj problemoj inter junuloj.

Deziras trovi homojn kun similaj ideoj por korespondado

**s-ro John Kailenta, 83 Kemball Ave,
Staten Island, New York 10314, Usono**

fe per nuklea superarmado kaj la fantomo de tergloba ne-niigo. Laŭ mi temas pri la urĝe bezonata homara alianco de prudenteco.

Al miaj amikoj kaj iamaj kunagantoj mi devas klarigi la fonon, sur kiu en mi konturiĝis tiu nova penskonstruaĵo, per tio samtempe prezentante ĝis nun de multaj neglektatajn trajtojn de nia lingvo kaj movado.

Kiam mi esperantistiĝis, t.e. antaŭ ekzakte 30 jaroj, tiam Eŭropo vegetadis meze de t.n. "malvarma milito". "Fera kurteno" disigis la popolojn kaj Germanion. Mi mem kaj multaj aliaj estis edukitaj laŭ malamikaj modeloj, kio signifas, ke pli-malpli agresivdefenda pens- kaj

sintena modelo regis nian konduton. Speciale en la sino de Eŭropo, kie la du blokoj kuntuŝiĝas, en la du germanaj ŝtatoj tiu konduto videblis.

Ŝajnas al mi esti logike, ke ankaŭ la esperantistoj sub tiuj kondiĉoj estis implikitaj. Sed ili demonstris tre frue, ke eblas aliaj vojoj, kaj tiel montris al la homoj novan pensmanieron jam en tempoj, kiuj ne liveris favorajn kondiĉojn tiucele.

Kiam mi lernis Esperanton, en nia lando ne ekzistis movado en organizita formo. En diversaj aliaj landoj de Eŭropo Esperanto havas la statuson de "danĝera lingvo", kiel Ulrich Lins pli poste titoligos sian libron. Kaj tamen mi lernas Esperanton, iel subkonscie supozante, per tio transsalti la barojn inter la popoloj. Kaj strange: inter miaj unuaj gekorespondantoj estas... germanoj el la alia parto de Germanio. Kun ili mi diskutas la politikajn problemojn de niaj ŝtatoj, la neceson de internacia, diplomatia agnosko de mia lando, la neceson de paca kunekzistado de ŝtatoj kun diversaj politikaj sistemoj k.s.

Post la jaro 1961 kaj la strikta fermo de la limo inter la du Germanioj, la fakta situacio en Eŭropo prezentiĝas pli klare ol antaŭe: Eŭropo estas dividita por netakseble longa tempo kaj bezonas novan strategion de kunvivado. Tiu nova strategio ne evoluas oficiale, sed ĝi estas konstatebla en la interrilatoj de esperantistoj...

En la 72a jaro de Esperanto, en 1959, UEA kongresas en Varsovio. Ankoraŭ ĉiuj klopodoj tien vojaĝi montriĝas vanaj. Tamen mi kaj miaj amikoj aŭskultas la varsoviajn mesaĝojn per leteroj kaj radio-elsendoj kaj ĝojas pri la partopreno de delegacio el GDR. Same ni konstatas la reekfloron de nia movado en Pollando, Bulgario kaj Hungario kaj esperas kontaktojn. Dank' al la solidareco de niaj amikoj eksterlandaj ni sukcesas unuope transsalti la barojn kaj partopreni en aranĝoj eksterlandaj.

En la jaro 1962 mi per la helpo de amikoj partoprenas IFEF-kongreson en Budapeŝto kaj tie ĵaluze konstatas, ke granda delegacio el okcidenta Germanio reprezentas la tutan Germanion. La partopreno en tiuj aranĝoj internaciaj akriĝas nian senton por du aferoj: unue ni ekkonas la neceson de samrajtigo por la du germanaj ŝtatoj kaj due ni komprenas, ke la interrilatoj inter ambaŭ germanaj ŝtatoj paradigmas por tuteŭropaj kontaktoj ĝenerale.

Ekde septembro 1962 mi havis la grandan feliĉon studi en Sofio. Ĝi estis la jaro de preparoj al nia 48a UK en Sofio kaj la 19a IJK en Vraca kaj mi admire observis ne nur



Multaj informoj pri Hans Eichhorn troviĝas en la teksto mem; eble vi rimarkis la spuron de psikiatra memanalizo, kiun oni atendus de tiu kelkfoja preleganto en la Internacia Kongresa Universitato. Lia rakonto reprenas la plej firman fadenon, kiu trakuris nian Jubilean Numeron ekde la enkonduka eseo de Waringhien. Bele resumas ĝin la titolo, kaj ankaŭ nia lasta ilustraĵo, paĝodorse. Kunportu tiun mesaĝon post la legado, por kuraĝigi kaj instigi vin, enpaŝante la duan jarcenton!

la vivantecon de la bulgara movado ĉie en la lando, sed partoprenis same la organizan preparon, spertis multajn personajn kontaktojn kaj sekve maturiĝis kiel esperantisto kaj homo en internacia etoso. Kelkaj rondvojaĝoj tra la lando kun vizitoj de Esperanto-societoj, kluboj kaj stud-rondoj ege influis mian penson kaj mi konsciiĝis pli, ke mia patrolando ja estas nur parto de la mondo kaj de Eŭropo, pensebla nur kune kun la aliaj partoj. En paroloj kun C. Pompilio, siatempe KKS de UEA, mi komprenis la dialektikan principon de neŭtrala fundamento, por garantii la tutmondecon de UEA kaj tiel certigi la liberan interŝanĝon de pensoj sen malobei la ŝtatajn limojn kaj principojn. Eĉ pli forte: nur respektante la diversajn politikajn perceptojn reĉiproke, eblas diskuti ilin. Samtempe pli reliefigis en mi la imago, ke tiu principo devus same ebligi la kontaktojn de ŝtatoj, kaj ke UEA estas modelo por vera paca kunekzistado!

Sed ankoraŭ en la 48a kaj 19a kongresoj ni ĵaluzedevis atenti la hison de du germanaj flagoj kaj la korektan nomigon de niaj ŝtatoj. Post mia hejmvveno la eventoj fulmrapiĝis sekvis unu la alian. En la jaro 1965 ne nur aperis la unuaj Esperanto-presiĝoj en GDR, kiujn mi kunhelpis traduki, sed estis fondita la t.n. "Centra Labor-rondo de Esperanto-Amikoj en Kulturligo de GDR", antaŭulo de la hodiaŭa Esperanto-Asocio de GDR, kies kunfondinto kaj estrarano mi estis ĝis 1974. Nun ni frontis la fakton, ke du germanaj landaj sekcioj ekzistas kaj necesas, ke ili samrajte intertraktu. Same necesis, ke la du ŝtatoj pace kaj samrajte intertraktu. Sed komencis la esperantistoj!

En 1966, dum Pente-kosto, delegacio de GDR-esperantistoj veturis okcidenten al la 44a kongreso de GEA por tiel malfermi dialogon trans la fera kurteno. Tiu pentekosta renkontiĝo tutgermana ŝajnas al mi historia evento ĝis nun ne sufiĉe aprezita. Sen havi oficialajn ŝtatajn kontaktojn, sen reciproka agnosko, la Esperanto-organizoj de ambaŭ Germanioj ekzamenas la interkompreniĝon, la pacan kunekzistadon. Estis por mi grandega honoro alparoli la kongreson en la malferma kunsido. Bedaŭrinde la manuskripto de mia alparolo perdiĝis. Sed mi ankoraŭ scias, ke mi proponis la kunlaboron cele al paca kunvivado, kio estus konforma al la spirito de Esperanto. Estis kvazaŭ utopia sceno: junulo de trans la fera kurteno profetas la neceson de dialogo kaj alianco de prudenteco, dum neniuj signoj montras oficialan ebligon de tiaj deziroj. La plimulto de la ĉeestantoj do iom amuzite aŭdas la vortojn de tiu fremda junulo, kiu avertas, ke Esperanto nur povas evolui en paca mondo. Laŭ mia hodiaŭa percepto tiu alparolo ja havas paradigman signifon por la nova pensado, kiu mondvaste necesas. Kiu en 1966 povis imagi, ke nur ok jarojn poste en Helsinko la eŭropaj ŝtatestroj subskribos dokumentojn, kiuj ĝuste tiun aspekton akcentas?

Nia kontakto en Bamberg havis sekvojn. GEJ, la junula sekcio de GEA, de tiam havis pli-malpli bonajn kontaktojn kun la junulara sekcio de GDR. Regule ni vizitis la seminariojn de GEJ kaj ricevis subtenon por nia laboro.

Refoje poste esperantistoj antaŭiros la oficialan politikon. En aŭgusto 1971 *The Scotsman* (skotlanda ĵurnalo) aperas kun artikolo titolita (en la angla), "Serĉante duan lingvon en Skotlando por du Germanioj", tiel kaptante la intereson de legantoj por raporto pri la ĵus okazinta 27a IJK en Edinburgo. Kaj fakte okazis io eksterordinara: la Komitato de TEJO unuanime akceptis duan germanan sekcion. Mi, hodiaŭ mezaĝa viro, volonte pensas pri tio, ĉar mi per speciala permesilo de la brita registaro (nia pasporto, kiel nia ŝtato, en 1971 ankoraŭ ne estis agnoskita!) vojaĝis al Edinburgo por tie transdoni al la komitato de TEJO nian aliĝpeton, kiu cetere trovis en la diskutado la varman subtenon de niaj amikoj en GEJ.

Tio, kio en 1971 estis eksterordinara kazo, tio hodiaŭ estas la principo de eŭropa politiko. Mi volas diri, ke ekzistas taŭgaj rimedoj por evoluo de interrilatoj, kiuj sekvas la principon de supernacia prudenteco, ĉar aliel la homaro ne sukcesos transvivi. Tamen ni ĉiuj scias, ke ekster la Esperanto-movado ĉi tiu procedo kelkloke lamas, aliloke eĉ stagnas. Kial nun la esperantistoj plirapidigas, ja eĉ antaŭiras en la ĝusta direkto?

Mia respondo estas: Ĉar Esperanto mem estas parto kaj idealo de la nova homa penso prudenta, kiu forrigas la malamikajn modelojn kaj serĉas unuigajn trajtojn, kiu forrigas la disigaĵojn kaj serĉas komunajn sentojn.

Mi kredas do sincere, ke la spirito de Esperanto instigis la procedon de nia akcepto en la internacian movadon.

Kaj samtempe mi per tio deziras esprimi, ke Esperanto estas nepre pli ol simpla komunikilo. Ĝi estas la konkreta esprimilo de la idealo pri interkompreniĝo. Hodiaŭ la politikistoj en Eŭropo pli kaj pli parolas pri "nia komuna hejmo Eŭropo", kiun ni devas gardi antaŭ nuklea pereco, kio necesigas la forigon de la malamiko-modelo kaj la kreadon de supernacia pensado sur la bazo de prudenteco. La esperantista popolo supernacia jam nun posedas la trajtojn de tiu estonta normigo.

Por mi estas Esperanto kaj la Esperanto-movado la **paradigmo** de absolute necesas, ĉiudecida nova pensado, de la alianco de prudenteco, kiu sola garantios al la homaro la transpaŝon en la trian jarmilon. Miaj spertoj kiel esperantisto dum la lasta trideko da jaroj estas por mi pruvo, kaj mi strebas al disvastigo de tiuj spertoj! Kiel diris Zamenhof: "Mi estas homo, kaj por mi ekzistas nur idealoj pure homaj; ĉiajn idealojn kaj celadon gente-naciajn mi rigardas nur kiel grupan egoismon kaj hommalamon, kiuj pli aŭ malpli frue devas malaperi kaj kies malaperon mi devas akceladi laŭ mia povo."



Argentina Esperantista Junulara Organizo
elstare tradukis kaj prezentas

La nova paradigmo en psikologio **(holokinetika psikologio)**

Verkita de Rubén Feldman González, unua prezidinto de la ARGENTINA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO (Argent-Ejo) kaj kunfondinto de Pasporta Servo de TEJO (1966).

Nun d-ro Feldman González estas kuracisto-pediatro-kirurgo kaj psikiatro-neŭrologo, universitata profesoro kaj Direktoro de Infanaj San-Centroj en Kalifornio, Usono.

La nova paradigmo en psikologio estas originale hispanlingva verko, publikigita de Paidos, Bonaero, Argentino, tradukata en kelkajn lingvojn (la anglan, nepalan, rusan, ĉinan ktp.).

La libro traktas pri nova observado (Unuiga Perceptado) valida por onta revolucio en ĉiutaga vivo, edukado kaj psikoterapeŭtiko.

La libro resumas universitatajn kolokvojn en 14 landoj de Norda kaj Latina Ameriko kaj Eŭropo dum kvin jaroj.

La aŭtoro kontaktis persone – interalie – mondkonatajn David Bohm (Universitato de Londono), Karl Pribram (Universitato de Stanford/Kalifornio, Usono), Burrus Skinner, Margaret Mahler kaj edukiston Jiddu Krishnamurti (plurfoje de 1975 ĝis lia morto en 1986), antaŭ ol publikigi ĉi tiun gravan kaj ellaboritan verkon 259-paĝan.

Aĉetebla en Esperanto de: 1) ELNA, Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono; 2,00 usonaj dolaroj. 2) Argent-Ejo, Viamonte 75, RA-2000 Rosario (S.Fe), Argentino; 1,00 \$ A. 3) Cercle Espérantiste de l'Agenais, F-48730 Laroque Timbaut, Francio; 35,00 FF. Via pago estos kontribuo nur por la organizo, de kiu vi petas la libron.

Aĉetebla ankaŭ de la Libroservo de UEA kontraŭ 15,60 gld. plus sendokostoj.

HEROLDO

DE ESPERANTO

LA PLEJ OFTA INTERNACIA GAZETO DE LA ESPERANTO-MOVADO

De 66 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- 16 numeroj jare
- Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- Junulara, instruista, literatura rubrikoj, libreccenzoj, listo de fakaj artikoloj en Esperanto
- Duobla kongresa numero, kalendaro de internaciaj renkontiĝoj kaj kongresoj
- Libera tribuno de la legantoj, anoncetoj, ŝak-problemoj, krucvortenigmoj, foto-filmo
- Sciencaj suplementoj, ktp.

Jarabono: 17,00 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro.

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA (40 guldenoj; por Nederlando 42,50 gld.)

Mendu kaj pagu por 1988 antaŭ septembro, kaj vi ricevos **senpage** la lastajn numerojn de 1987.

Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska Calle de Juan Ramón Jiménez n-ro 28, 6° A, E-28036 Madrid 16, Hispanujo



Dinamisma Roterdamo,
la plej granda havenurbo en la mondo,
atendas vin por la 73a Universala Kongreso en 1988!

**Venu kunfesti la 80an datrevenon de UEA
en la ĉefurbo de la Movado!**



Ĉi tiun paĝon donacis la presisto de UEA, Grafika Entrepreno Tuijtel, Hardinxveld-Giessendam.